

V. 19039/1978
EL POPOLA
ĈINIO

中國報道

1

1978



Ĉinaj mont- grimpistoj sur Tomur





Sportistoj marŝas preter glacia ravino.

Tomur, la plej alta montpinto de Tianŝan-montaro en Hingiang de Ĉinio



Ĉe la piedo de Tomur






Kuirejo sur alta monto



Amika interhelpo
(fotita de ĈEN LEJ-
SENG)






Ĉe kampejo en loko kun absoluta alto de 7,000 metroj



Kolektado de rokspcimenoj sur la montpinto



Tra kruta deklivo (fotita de ĈEN LEJŠENG)



Fotado sur la montpinto



Tibetaniĵoj Ĉamco (maldekstre) kaj Jundron sur la montpinto

Ruĝa kvinstela standardo super Tomur



EL POPOLA ĈINIO

中國報

1978
N-ro 1
(232)

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

Ĝenerala distribuanto: Guozi Shudian P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

KOVRILO:

- p. 1. Ĉina kaj rumana artistoj
- p. 4. Floroj



Enhavo

Prezidanto Maŭ Zedong pri Esperanto	2
Ĝoŭ Enlaj vivos eterne kun siaj meritoj	4
Nova paŝo de la ĉina industrio	8
Nova fizionomio de la Pekina Kemia Fabriko	13
Ne plu plago de orientaj migrantaj lokustoj en Ĉinio	17
Ruĝa flago starigita sur la montpinto Tomur	19
Antikva urbo en verdajoj	21
Grundologo Hoŭ Guanggiong	24
Feliĉaj horoj	27
Bona kuracistino	30
Ĉen Gingjun inter elementaj lernantoj	33
Dum laboro de iliaj patrinoj	35
ESP-NOVAĴOJ: Vizito al islanda esperantisto	38
AMIKECO: Senditoj-artistoj de Rumanio	39
ĈINAJ NACIECOJ: La menbaoj	41
EL ĈINA MODERNA HISTORIO: La Ĉina-Franca Milito	43
KALEJDOSKOPO: Luohan-frukto	45
INTER NI: Ĉe la sojlo de la jaro 1978	46
Konciza Mapo de Ĉinio	47
KURANTAJ AFEROJ	28, 47, 48

Prezidanto Maŭ Zedong pri Esperanto

de VANG TAŬ

EN la tagoj, kiam nia tuta popolo memoras nian grandan gvidanton kaj instruiston Prezidanton Maŭ okaze de la unua datreveno de lia forpaso, ni esperantistoj aparte sopiris al li, kiu faris la faman skribaĵon pri Esperanto frue en 1939: “**Mi dirus ankoraŭ la samon: Se oni prenas Esperanton kiel formon por porti la ideon vere internaciisman kaj la ideon vere revolucian, do Esperanto povas esti lernata kaj devas esti lernata.**” Per tio li montris al ni esperantistoj la ĝustan direkton en niaj laboroj, kuraĝigante nin uzi Esperanton en servo al la ĉina popolo kaj al la popoloj de la tuta mondo.

Esperanto enkondukiĝis en Ĉinion de komencaj jaroj de la 20-a jarcento. Tiutempe oni lernis kaj uzis ĝin kun diversaj celoj. Inter ili nombro da progresemaj personoj subtenis ĝin kun la celo antaŭenpuŝi la socion. Lusin, la granda revoluciisto kaj literaturisto de Ĉinio estis unu el tiuj subtenantoj. De la tridekaj jaroj, sub la influo de la Komunista Partio de Ĉinio ĉinaj progresemaj esperantistoj elmetis la devizon “Per Esperanto por la Liberigo de Ĉinio”, ligante ĝin kun la liberiga movado de la ĉina nacio kaj kun la Kontraŭjapana Nacisava Movado. Ili tradukis fremdlandajn revoluciajn esperantajn librojn kaj artikolojn en la ĉinan lingvon kaj disvastigis Marksisman-Leninisman kaj la veron de la Oktobra Revolucio. Kaj samtempe ili uzis Esperanton por diskonigi al la mondo la batalojn de la Ruĝa Armeo kaj tiujn de la ĉina popolo kontraŭ japana agreso kaj malkaŝis la krimojn de Ĉiang Kajŝek, kiu perfidis la nacion, kapitulacis al Japanio kaj subpremis la komunistojn kaj la popolon.

Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio ĉiam tenis la esperantan laboron en sia zorgo kaj atento. Dum la malfacilaj jaroj de la Kontraŭjapana Rezistmilito jam fondiĝis en Janan la Jan-ana Esperantista Ligo. Krome oni eldonis la revuon “Jan-ana Esperantisto” kaj funkciigis esperantajn kursojn en la Ĉina Kontraŭjapana Milita kaj Politika Kolegio kaj en la Arta kaj Literatura Kolegio en Janan.

En vintro de 1939, Jan-anaj esperantistoj aranĝis esperantan ekspozicion kaj petis skribon de Prezidanto Maŭ, kiu ĝoje konsentis pri tio. Kaj la rezulto estis la menciita skribaĵo.

La dato 9-a de decembro 1939 do fariĝis neforgesebla tago por la ĉinaj esperantistoj. Ĉar en tiu tago Prezidanto Maŭ faris la brilan skribaĵon, kiu montras al ni, ke Esperanto estas formo uzebla por porti ian ideon kaj estas ne nur lerninda sed eĉ lernenda, se oni uzas ĝin por porti la ideon vere internaciisman, vere revolucian. Per la skribaĵo, Prezidanto Maŭ instruis al ni, ke kiel revoluciulo oni nepre devas uzi ĝin kiel ilon en servado al la revolucia afero de la proletaro kaj al la liberigo de la tuta homaro. Kaj Esperanto, kiel internacia komuna lingvo, povas ekzisti kaj disvolviĝi nur kiam ĝi servas al la progreso de la homaro kaj la liberigo de nacioj. Per tio li montris direkton al la lernantoj kaj uzantoj de Esperanto.

La skribaĵon de Prezidanto Maŭ oni metis sur la plej okulfrapan lokon en la ekspozicio. Tiel rapide disvastiĝis la famo pri la skribaĵo en Janan. Multaj kadroj, revoluciaj intelektuloj kaj komandantoj kaj soldatoj de la Okavoja Armeo diligente eklernis Esperanton en postlaboraj

horoj. Iuj el ili scipovis eĉ kanti esperantajn kantojn. La laboristoj de la Presejo de la Okavoja Armeo ne nur komencis lerni Esperanton, sed ankaŭ helpis por presi la revuon "Jan-ana Esperantisto" tipografie anstataŭ mimeografie. Dank' al tio, kreskis la eldona kvanto de la revuo kaj tiel ebligis ĝia sendado al eksterlandaj legantoj por informi ilin pri la vera stato de la Kontraŭ-japana Rezistmilito de Ĉinio.

Tuj poste la informo pri la surskribo atingis ankaŭ Ĉengdu, Ĉongking, Gujlin kaj aliajn urbojn sub la regado de Kuomintangoj. Kaj tieaj progresemaj esperantistoj faris la samon, eĉ eldonis esperantajn librojn, revoluciajn kantarojn kaj karikaturojn periodaĵoj kun esperantaj klarigoj en servo al la revolucia batalo de la ĉina popolo. Sub la terora regado de la Kuomintangaj reakciuloj, iuj esperantistoj sendis eksterlanden en kovertoj esperantajn artikolojn tajpitajn aŭ multobligitajn. Eĉ en malliberejoj iuj esperantistoj instruis Esperanton al siaj kamaradoj, redaktis esperantan bultenon, propagandis venkojn de la liberiga milito kaj batalis firme kontraŭ la malamiko.

Post la venko de la ĉina revolucio, sub la kora zorgo de Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio aperis la revuo "El Popola Ĉinio" en la jaro 1950. Pli poste la Radio Pekino komencis la esperantan disaŭdigadon (1964) kaj la Fremdlingva Eldonejo de Ĉinio starigis la esperantan sekcion (1966).

Laŭ la direkto montrita en la skribaĵo de Prezidanto Maŭ, niaj esperantaj laborantoj esperantigis multajn el liaj verkoj kaj paroladoj, gravaj deklaroj de niaj partio kaj registaro pri internaciaj problemoj kaj aliajn librojn pri la nova Ĉinio. Iliaj laboroj ludis certan rolon en konigado pri la nuna Ĉinio al alilandaj esperantistoj kaj popoloj kaj en iliaj bataloj kontraŭ imperiismo, reviziismo kaj hegemoniismo. Post sia vizito al la

Faksimilo de la skribaĵo de Prezidanto Maŭ pri Esperanto estas farita de nia redakcio por donaci al amikoj de EPC.

Ekspozicio pri Esperanta Laboro en 1963, Vicĉefministro Ĉen Ji faris gravan paroladon en la Kunsido pri Esperanta Laboro kaj donis varmajn kuraĝigon kaj laŭdon al nia laboro en la nomo de la Centra Komitato de la Partio kaj la Ŝtata Konsilantaro. En la jaro 1967 dum la kultura revolucio nia gazeto rekomencis aperadi en ĉiu monato.

Dum pli ol 20 jaroj post la Liberiĝo en nia lando aperis en Esp. jam kvar volumoj de la "Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong", granda nombro de liaj artikoloj eldonitaj libroforme, "Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong", "Noveloj de Lusin" kaj aliaj pli ol 200 libroj politikaj, artaj, literaturaj kaj bildaj. Nia gazeto distribuiĝas en multaj landoj kaj regionoj de la mondo kaj trovas bonan akcepton ĉe en- kaj ekster-landaj legantoj. Pere de eldonado de esperantaj libroj kaj gazeto kaj radiodisaŭdigo estas raportataj la grandaj venkoj de Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso, atingoj de la socialismaj revolucio kaj konstruado en nia lando kaj la revolucia spirito de nia popolo. Dank' al tio kreskis la kompreniĝo kaj amikeco inter nia popolo kaj la popoloj de la tuta mondo.

Pro multiĝo de esperantaj eldonaĵoj pli kaj pli da homoj eklernas Esperanton en nia lando. Samtempe en la praktikado, ĉinaj esperantaj laborantoj ankaŭ kontribuis en riĉigado de la lingvo. Kun la disvolviĝo de la Esperantomovado, precipe kun la senĉesaj venkoj de la liberiga afero de la homaro, prezentiĝas por Esperanto vastaj kaj belaj perspektivoj.

La skribaĵo de Prezidanto Maŭ pri Esperanto donis kaj donas grandan influon ankaŭ al alilandaj esperantistoj. Iu fremdlanda esperantisto skribis al ni: "La eminenta kamarado Maŭ montris modelon por via kaj ankaŭ nia aktivado por pli bona kaj racia mondo per sia inspira eldiro pri Esperanto." Tiu skribaĵo estas komprenata kaj laŭdata de pli kaj pli da eksterlandaj esperantistoj.

Ni nepre bone faros niajn laborojn kaj dediĉos nian forton por pli multe kontribui en plifortigado de la amikeco kaj unuiĝo de la ĉina popolo kun la popoloj de aliaj landoj laŭ la direkto montrita de Prezidanto Maŭ.

LIU ŜI:

Ĝoŭ Enlaj kun siaj

*La popola ĉefministro amas la popolon,
La popolan ĉefministron amas la popolo.
Li dividis dolĉon kaj maldolĉon kun popolo,
La popol' ligiĝas kun li vere kor' kun koro.*

Tiu poemo estis verkita de pekina amaso kelkajn monatojn post la forpaso de Kamarado Ĝoŭ Enlaj pro sopiro al li. Nun tiu granda persono jam forpasis du jarojn. Sed la popolanoj neniam povos finrakonti pri liaj brilaj dumvivaj aktivadoj de batalo por la proleta revolucia afero kaj pri liaj sublimaj virtoj. Li ĉiam vivas en la koro de centoj da milionoj da popolanoj.

Ĉi tie ni raportas al niaj legantoj pri fragmentoj de liaj revoluciaj aktivadoj en Hi-an, Ĉongking kaj Nankino en la gravaj historiaj periodoj antaŭ la naskiĝo de la nova Ĉinio.

Paca Solvo de la Hi-an-a Evento

La Hi-an-a Evento okazis antaŭ 41 jaroj. Kun forpaso de la tempo, oni pli klare vidis la historian signifon de la Hi-an-a Evento kaj ĝia paca solvo. Kaj la merito de Kamarado Ĝoŭ Enlaj en ĝia paca solvado estis orlittere registrita en la historio.

En 1936, la japanaj imperiistoj jam invadis en nordan Ĉinion kaj sin preparis por fari plenkampsan militon kontraŭ Ĉinio, celante ĝin engluti. Tiutempe, la kuomintanga nordorienta armeo kun Ĝang Hjueliang kiel la komandanto kaj la kuomintanga nordokcidenta armeo kun Jang Huĉeng kiel la komandanto aprobis, pro influo de la Ruĝa Armeo kaj la kontraŭjapana

vivos eterne

meritoj

movado de la popolo, la kontraŭjapanan nacian unuecfronton elmetitan de la Komunista Partio de Ĉinio kaj postulis, ke Kuomintango kun Ĉiang Kajŝek kiel la ĉefo interligiĝu kun KPC por kune rezisti kontraŭ la japana agreso. Ĉiang rifuzis ilian postulon kaj eĉ pliintensigis sian militan “ekstermadon al la Kompartio”, kaj ordonis buĉi kontraŭjapanajn gejunulojn en Hi-an. Je la 12-a de decembro, kiam Ĉiang Kajŝek veturis al Hi-an por fari dispozicion kontraŭ la Kompartio, Ĝang kaj Jang subite lin arestis, kaj tiel okazis la Hi-an-a Evento, kiu skuis Ĉinion kaj la mondon.

Ĉiang Kajŝek obstine persistis en la interna milito, oponis al kontraŭjapana aktivado kaj subpremis patriotojn, kio forte indignigis la polon. Aŭdinte ke Ĉiang kajŝek estis kaptita, la popolo varme aplaŭdis senescepte.


Post aresto de Ĉiang Kajŝek, la ĉina situacio subite streĉiĝis. La projapanaj personoj, kun He Jingkin kiel la ĉefo en la reganta kliko de Kuomintango, intencis forigi Ĉiang Kajŝek, por anstataŭigi lin per si mem kaj tute kapitulaci al la japana imperiismo. Grandskala interna milito povis okazi en ĉiu sekundo, kaj la sorto de la patrolando kaj la nacio dronis en krizo.

Tiam la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio en norda Ŝenhi-provinco ricevis telegramon de Generalo Ĝang Hjueliang, en kiu li petis, ke KPC sendu delegacion al Hi-an por konsiliĝi pri rezistado al la japana agreso. Por rapidigi la starigon de la kontraŭjapana nacia

unuecfronto, Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de KPC elmetis la principon de paca solvo de la Hi-an-a Evento, kaj decidis sendi al Hi-an delegacion kun Kamarado Ĝoŭ Enlaj, vicprezidanto de la Milita Komisiono de CK de KPC, kiel la ĉefo kaj Kamarado Je Gianjing kiel ĝia membro.

Tiam pasis nur iom pli ol unu jaro post la atingo de la Ĉina Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo al norda Ŝenhi post la Longa Marŝo. Kamarado Ĝoŭ Enlaj, kiu plurfoje malsaniĝis survoje de la Longa Marŝo kaj estis lacigita de pezaj laboroj, estis tre malgrasa kaj malforta. Sed, por plenumi la gravan taskon asignitan de la Partio kaj la popolo, li kaj liaj laborantoj rajdis, de Baŭ-an — la sidejo de CK de KPC, du tagojn en frosta vento de la altebenaĵo, kaj venis je la 14-a de decembro al antaŭurbo de Jan-an, kaj veturis al Hi-an je la 16-a de decembro per aviadilo alsendita de Generalo Ĝang Hjueliang. Poste ankaŭ Kamarado Je Gianjing alvenis.

Post kiam Ĝang kaj Jang kaptis Ĉiang Kajŝek, ili ne havis klaran difinitan opinion pri traktado de Ĉiang. Iliaj superaj oficiroj havis diversajn opiniojn. Post sia alveno al Hi-an, Kamaradoj Ĝoŭ Enlaj kaj Je Gianjing tuj komencis streĉan laboron kaj klopodis movi ĉiujn patriotajn fortojn al la granda kontraŭjapana batalo. Observante la principon de la Centra Komitato de la Partio kaj Prezidanto Maŭ, ili plene aprobis la agon de Ĝang kaj Jang, poste analizis la tiaman situacion kaj montris la jenon: La kontraŭjapana indigno de la tuta popolo senĉese leviĝis kaj en Kuomintango aperis patriotaj fortoj; la invado de Japanio por sole engluti Ĉinion difektis la interesojn de Britio kaj Usono en Ĉinio, kio ebligis devigi Ĉiang Kajŝek, kiu reprezentis iliajn interesojn, rezisti al la japana agreso kaj pace solvi la Hi-an-an Eventon. La paciencaj analizo kaj persvado de Kamarado Ĝoŭ Enlaj ricevis laŭdon de Ĝang kaj Jang. Ili diris, ke vere admirinda estas la Komunista Partio de Ĉinio, kiu metas la interesojn de la patrolando kaj la nacio super sian historian malamon kontraŭ Kuomintango. Ili akceptis la opinion de KPC pri paca solvo de la evento kaj firme konvinkiĝis pri la ebleco devigi Ĉiang Kajŝek al rezisto al la agreso de Japanio.



Kamaradoj Ĝoŭ Enlaj (la dekstra) kaj Je Ĝianĵing (la maldekstra) kun kuomintang-a reprezentanto (la meza) en 1937, antaŭ la Oficejo de la Okavoja Armeo en Hi-an

Tiam, en la armeoj de Ĝang kaj Jang kaj en la socio leviĝis diversaj haosaj pensoj. Por ilin unuigi en la kontraŭjapanan kaj nacisavan principon de KPC oni devis firme kapti la ŝanĝiĝeman situacion kaj tuj fari decidon pri solvo de la aperintaj problemoj. Kamarado Ĝoŭ Enlaj konsiliĝis kun Ĝang kaj Jang kiel bone persvadi diversajn personojn, kaj ke Ĝang kaj Jang faru militan manovron por rebati eventualan atakon de la Nankinaj projapanaj personoj. Post penlaborado de pluraj diurnoj, la voĉo de Kamarado Ĝoŭ Enlaj iom raŭkiĝis kaj liaj okuloj ruĝiĝis. Sed, kiam li aŭdis, ke iuj oficiroj de la armeo de Jang Huĉeng forte postulis mortigi Ĉiang Kajŝek, li senhezite decidis iri al ili. Multaj estis maltrankvilaj pri lia sekureco, sed li diris: “Ne maltrankviliĝu, la postulo devenas de ilia patriota penso kaj mi povos trovi ĉe ili komunan lingvon.” Li venis inter tiujn armitajn oficirojn. Iu el ili kriis: “Se oni ne mortigos Ĉiang Kajŝek,

tion sekvos senfinaj ĝenoj.” Kamarado Ĝoŭ Enlaj respondis: “Mortigo estas facila, unu vorto sufiĉas por tio.” La homoj tuj kvietiĝis. Tiam Kamarado Ĝoŭ Enlaj afable montris: Kapto de Ĉiang Kajŝek en la Hi-an-a Evento diferencis de la aresto de A. F. Kerenskij¹ en la Oktobra Revolucio, kaj de la kapto de Napoleono² en Vaterlo. La antaŭa rezultiĝis de la venko de la revolucio kaj la posta estis tragedio post malvenko en milito. Kvankam Ĉiang Kajŝek estis kaptita, tamen liaj militaj fortoj ne estis difektitaj. Sub la forta postulo de la tuta popolo pri rezisto al la agreso de Japanio, ankaŭ Britio kaj Usono aprobis pacan solvon de la Hi-an-a Evento. Laŭ la naciaj intereso, devigi Ĉiang al rezisto al la japana agreso kaj starigi la tutlandan kontraŭjapanan nacian unuecfronton estis necesa kaj tute realigebla. La longa detala klarigo kaj trafa analizo de Kamarado Ĝoŭ Enlaj kvazaŭ forigis densan nebulon kaj vidigis al ili serenajn ĉielon.

Unu flamiĝema oficiro kapjesadis kaj diris: “La Kompartio plej malamas Ĉiang Kajšek. Kiom da komunistoj li masakris sole en la dekjara interna milito! Lia sanga ŝuldo profundas kiel maro! Sed la Kompartio metas la naciajn interesojn super tion, ĝi senegoisme rekompencas la kuomintangan malbonon per bono. Tio ja estas admirinda.” Li ekstaris kaj esprimis respekton al Ĝoŭ Enlaj per militista saluto.

Ĝoŭ Enlaj aktive faris persvadon ne nur al superaĵ personoj, sed ankaŭ al malsuperaĵ oficiroj de Ĝang kaj Jang por forigi iliajn dubojn. “Kion fari, se Ĉiang Kajšek perfidos sian konsenton?” “Kion fari, se li venĝos sin kontraŭ ni?” iuj demandis. Li pacience faris klarigojn. Li diris: “Vi ne timu, ke li perfidos sian promeson. Se tion li poste faros, li levos ŝtonon kaj faligos ĝin sur siajn proprajn piedojn, ĉar tiamaniere li malkaŝos sian kontraŭpopolan vizaĝon antaŭ la tuta popolo. Kaj oni ankaŭ ne devas timi, ke li venĝos sin. Se nur la nordorienta kaj nordokcidenta armeoj kaj la Ruĝa Armeo unuiĝos, firme faros reziston kaj akcelos la starigon kaj disvolviĝon de la popola kontraŭjapana unuecfronto, la popolaj fortoj grandiĝos kaj tiam li ne povos fari venĝon kontraŭ ni.”

Kamaradoj Ĝoŭ Enlaj, Je Gianjing kaj aliaj analizis la situacion kaj respektive vizitis rondojn, instituciojn, trupojn kaj lernejojn por kunvoki kunsidojn, fari paroladojn, malkovri intrigojn de la projapanaj personoj en komploto kun la malamikoj kaj propagandi la ĝustajn opiniojn de KPĈ, por ke ĉiuj kontraŭjapanaj fortoj unuiĝu por nacisavado. Iufoje, en amasa kunveno de mezlernejo Kamarado Ĝoŭ Enlaj faris propagandon pri rezisto al la agreso de Japanio, la aŭskultantoj ĉiam pli multiĝis, tiel ke la kunveno ne povis enteni ilin, kaj multaj devis sidi sur arboj kaj muroj. Lia klarvida kaj elokventa parolado estis de tempo al tempo rompita de aplaŭdoj kaj eĉ emociis ĉeestantajn kuomintangajn patriotojn ĝis larmoj.

Kamarado Ĝoŭ Enlaj faris vid-al-vidan batalon kontraŭ Ĉiang Kajšek. Vespere de la 24-a de decembro, Kamarado Ĝoŭ Enlaj intervidiĝis kun Ĉiang Kajšek. Vidinte lin, Ĉiang paliĝis de timo kaj malleviis sian kapon. Ĝoŭ Enlaj serioze

montris: Vi perfidis la testamenton de S-ro Sun Jatsen kaj la revolucion, vi faris dekjaran kontraŭrevolucion internan militon, kio kaŭzis al la ĉina nacio profundan mizeron. En la nuna ekstreme serioza kaj kriza momento de la nacio, sen rezisto al Japanio Ĉinio ne povas ekzisti, sen solidareco Ĉinio ne povas elsaviĝi, persisti en la interna milito signifas nur plirapidigon de la pereco de la nacio. Se nur vi konos la ĝeneralan situacion, tuj praktikos reziston al la agreso de Japanio kaj demokratian politikon, nia partio ne venĝos nin kontraŭ vi pro viaj antaŭaj krimoj, kaj Generaloj Ĝang kaj Jang certe vin liberigos. Alie, vi estos eterna krimulo de la nacio. Pro la aktiva klopodo de Kamarado Ĝoŭ Enlaj kaj la KPĈ-delegacio kaj post firmaĵ bataloj, Ĉiang Kajšek devigite rezignis la reakcian politikon “por rezisti kontraŭ la eksterlandaj malamikoj necesas sekurigi unue la internon”, akceptis la ok opiniojn de Ĝang kaj Jang kaj konsentis ĉesigi la internan militon. Post sia akcepto de la opinioj pri kuna rezisto kontraŭ Japanio, Ĉiang Kajšek estis liberigita.

Kiam Ĉiang Kajšek forlasis Hi-an por reveni al Nankino, Generalo Ĝang Hjueliang lin akompanis, sen konsiliĝo kun Ĝoŭ Enlaj. Informiĝinte pri tio Kamarado Ĝoŭ Enlaj tuj veturis al la aerodromo por lin deteni, sed la aviadilo jam forflugis. Post atingo al Nankino, Ĝang Hjueliang estis tuj arestita de la perfidema Ĉiang Kajšek. En la nordorienta armeo tuj aperis akraj konfliktoj. Agitite de trockiistoj kaj naciperfiduloj iuj homoj en ili murdis superan oficiron kiu pledis por kuna rezisto al la japana agreso kaj atribuis la krimon al KPĈ. Informiĝinte pri tio, malgraŭ sia persona sekureco Kamarado Ĝoŭ Enlaj tuj iris al la nordorienta armeo kun ĉiuj membroj de la delegacio sub sia gvido, kondolencis kaj konsolis familianojn de la mortinto kaj montris, ke sur la vojo de unuiĝo por rezisti al la japana agreso ekzistas batalo, la vojo estas zigzaga, sed la perspektivo luma. La ago de la delegacio montris justan starpunkton de KPĈ, malkovris la intrigon de la malamikoj, unuiĝis kun la plejparto de la oficiroj kaj soldatoj de la nordorientaj armeoj, izolis la malmultajn kontraŭulojn, firmigis kaj disvolvis la atingojn en la paca solvado de la Hi-an-a Evento.

Kamarado Ĝoŭ Enlaj pasigis en Hi-an pli ol 60 neordinarajn tagojn, eliris frumatene kaj revenis malfrue. En profunda nokto li aŭskultis raportojn, analizis la situacion, serĉadis kontraŭrimedojn kaj preparis raportajn telegramojn al Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio. Multaj malfaciloj kaj danĝeroj estis venkitaj de li. Li malgrasiĝis, sed neniam pensis pri sia sano. Post kiam stariĝis la Oficejo de la Ruĝa Armeo en Hi-an (poste alinomiĝis la Oficejo de la Okavoja Armeo³ en Hi-an), li transloĝiĝis de la gastejo de Ĝang kaj Jang al la oficejo. Tie li loĝis en ĉambreto kun areo de 9 kvadrataj metroj, en kiu estis lito por unu persono, skribotablo kaj seĝo, kaj libera spaco apenaŭ sufiĉa por unu homo. Li faris matenan korpokzercon kaj prenis manĝon kune kun la aliaj kamaradoj. En nokto, kiam aliaj kamaradoj enlitiĝis, li ankoraŭ laboris. Kamaradoj admonis, ke li ripozu iom pli multe, li diris, ke li venis al Hi-an ne por ripozi, sed por labori. Kiam li laciĝis de laboro, li dormetis en la seĝo. Vidinte tion kamarado en deĵoro senbrue iris al li kaj lin kovris per vesto, sed ne volis vekti lin por ripozi en la lito, ĉar post vekigo li certe daŭrigos la laboron.

En la paca solvado de la Hi-an-a Evento Kamarado Ĝoŭ Enlaj montris firman starpunkton de proleta revoluciulo, revolucion kuraĝon, lertan arton de batalo kaj eminentan kapablon de organizado.

(Daŭrigota)

1. *Kerenskij estis reakcia ĉefo de la rusa burĝa provizora registaro kaj arestita de la insurekciuloj gvidataj de la Bolŝevika Partio en la Oktobra Revolucio.*
2. *Napoleono (1769-1821 p. K.), franca imperiestro, estis kaptita post la malvenko en Vaterlo sub peza bato de la brita kaj prusa armeoj.*
3. *La Okavoja Armeo kaj la Nova Kvara Armeo estis popolaj armeoj sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio dum la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito. Post kiam stariĝis la Kontraŭjapana Nacia Unuecfronto sub la gvido de KPC, la Komunista Partio de Ĉinio reorganizis en 1937, laŭ la kontrakto kun Kuomintang, la ĉefforton de la Ĉina Laborista-Kampana Ruĝa Armeo en la Okavojan Armeon de la Nacia Revolucia Armeo kaj gerilajn taĉmentojn de la Ruĝa Armeo en ok sudaj provincoj en la Novan Kvaran Armeon de la Nacia Revolucia Armeo.*

Nova paŝo la ĉina

TUJ branĉoj de nia industrio iam stagnis aŭ eĉ retroiris en produktado pro la subfosado de la “kvarpersona bando”. Dank’ al frakaso de la “kvarpersona bando” en oktobro de 1976, grava ŝanĝo jam okazis al tia situacio. En la lastaj 12 monatoj, sub la gvido de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio estrata de Prezidanto Hua Guofeng, la tuta lando unuanime faris profundajn malkaŝon kaj kritikon al la krimo de la “kvarpersona bando” kaj klopodis por venki la malfacilojn kaŭzitajn de ilia subfosado. Nun aperas situacio de nova antaŭensalto de la nacia ekonomio.

SENĈESAJ NOVAJ REKORDOJ

De la komenco de 1977, la industria kaj trafika fronto de nia lando senĉese akiris novajn atingojn. Post kreiĝo de rekordo de la tutlanda totala industria produktovaloro en la pasinta junio, la produktado daŭre progresas. La tutlanda industria produktovaloro de januaro ĝis oktobro kreskis je pli ol 13 procentoj kompare kun tiu de la sama periodo de 1976.

En la pasinta jaro, la petrola industrio de nia lando, kiu estis avangarda branĉo en la ĉina industrio, denove atingis elstaran sukceson. Surbaze de firma kreskado en sinsekvaj jaroj, la produktokvantoj de petrolo kaj natura gaso en la periodo de januaro ĝis oktobro kreskis respektive je 8.4% kaj 23% kompare kun tiuj de la sama periodo de 1976. Senprecedence grandskala petrolgeologia prospektado estas farita en 1977, kaj signoj de petrolo kaj natura gaso aŭ industria olefluo estas malkovritaj en novaj teraj aŭ maraj regionoj de nordokcidenta, sudokcidenta kaj

de industrio

de JU FANG

norda Ĉinio, kaj altproduktaj petrolaj kaj gasaj putoj estis boritaj unuj post aliaj.

La ĉiumonata produkta plano de karbo de la ŝtato estas superplenumita, kaj en la varmega pluvoza aŭgusto plej bona nivelo estis atingita en produkto de karbo kaj etendigo de la galerioj. La produktokvanto de elektro de la unuaj 10 monatoj de 1977 estis je 8.7% pli granda ol tiu de la sama periodo de la antaŭlasta jaro.


Por rapidigi la meĥanizon de agrikulturo de nia lando, la industria branĉo liveris pli multe da agrikulturaj maŝinoj ol en la pasintaj jaroj. La produktokvanto de 7 ĉefaj specoj de agrikulturaj maŝinoj inkluzive de traktoroj, kombajnoj kaj dizeloj de la unuaj 10 monatoj de 1977


pligrandiĝis je 10 ĝis 50 procentoj kompare kun tiu de la sama periodo de la antaŭa jaro. Multe kreskis ankaŭ la produktokvanto de kemisterko kaj insekticido.

La ŝtala industrio estis serioze subfosita de la "kvarpersona bando" en la lastaj jaroj. Ekde majo de 1977, la situacio pliboniĝis monaton post monato. En la pasinta oktobro la produktokvanto de ŝtalo superis la plej altan nivelon de la sama periodo en la historio. La Anŝan-a Fera-Ŝtala Kompanio, kiu estas la plej granda bazloko de nia fera-ŝtala industrio, superplenumis la produktan taskon de ŝtalo difinitan de la ŝtato por 1977. La Ĉefurba Fera-Ŝtala Kompanio kaj la Tangŝan-a Fera-Ŝtala Uzino kreis tutlandajn rekordojn de longeco de uzo-tempo de Bessemer-fornego kaj Bessemer-fornego kun deflanka oksigen-blovo. La rafiniteco de erco de la ferminejoj de Nanfen de Liaŭning-provinco kaj Daŝihe de Pekino jam atingis la avangardan nivelon de la mondo.

La totala produktovaloro de la malpeza industrio en la unuaj 10 monatoj de 1977 kreskis je 14.3% kompare kun tiu de la sama periodo en 1976. La produktokvanto de kotona fadeno, kotona ŝtofo, sukero kaj aliaj vivbezonaĵoj kreskis

Giganta ilmaŝino produktita de la Vuhan-a Fabriko de Pezaj Ilmaŝinoj





Gvidanto de la Petrolkemia Ministerio partoprenas en fizika laboro en baza unuo.

firme kaj tiu de aliaj produktaĵoj kiel brak-horloĝoj kaj televidiloj kreskis grandskale.

La fervojoj kaj surakva trafiko ĉiuj superplenumis la transportajn planojn de la ŝtato.

La fundamenta konstruado de 1977 iris pli bone ol en la antaŭaj 6 jaroj. Alia nombro da ĉefaj konstruaĵoj de metalurgia, petrola, karba, elektra kaj kemia industrioj kaj trafikado estis ekfunkciigita. La totala kapacito de la generatoroj instalitaj en la unuaj 10 monatoj de 1977 estis kvinoblo de tiu de nia plej granda industria urbo Ŝanhajo en la komenca periodo post la Liberiĝo. 9 modernaj sukeraj fabrikoj estis finkonstruitaj antaŭdate en suda Ĉinio, kaj la eksterplana produktopovo de sukero de Guangdong-provinco en 1977, unu el niaj sukeraj bazlokoj, estis trioblo de tiu en 1976. En Ŝenhi-provinco en nordokcidenta Ĉinio ekfunkciis la dua elektra fervojo de nia lando. Modernaj internaciaj aerodromoj estas rapide konstruataj en Pekino, Tiangin, Hefeĵ kaj Harbino. Nombro da

loĝdomoj estas konstruitaj en dekoj da urboj inkluzive de Pekino, Ŝanhajo, Tiangin, Kantono kaj Ŝenjang, kaj en Pekino konstruiĝis novaj loĝdomoj por laboristoj kaj oficistoj kun plankareo de pli ol 2,000,000 kvadrataj metroj kaj tiu kvanto estas la plej granda en la historio.

En la menciitaj faktoj vi povas vidi, ke la ĉina popolo estas energie laboranta por efektivigi plenampleksan modernigon de niaj agrikulturo, industrio, scienco, tekniko kaj nacidefendo kaj konstrui Ĉinion en modernan socialisman potencon en la fino de la kuranta jarcento.

La grandioza celajo de modernigo de niaj agrikulturo, industrio, scienco, tekniko kaj nacidefendo estis deklarita de Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj en la Kvara Tutlanda Popola Kongreso en 1975, laŭ instrukcio de Prezidanto Maŭ Zedong. Por efektivigi tiun celajon, ni ellaboris planon por finkonstrui sendependan kaj relative kompletan industriajn sistemon kaj naciekonomian sistemon de la tuta lando en 1980 kaj fundamente plenumi teknikan reformon de la nacia ekonomio kaj poste sur tiu bazo konstrui paŝon post paŝo relative harmonie kundisvolviĝantan ekonomian sistemon de agrikulturo, malpeza industrio kaj peza industrio en la 6 grandaj regionoj de nordorienta, norda, orienta, sudcentra, nordokcidenta kaj sudokcidenta Ĉinio.

Modernigo de niaj agrikulturo, industrio, scienco, tekniko kaj nacidefendo estas la komuna deziro de la ĉina popolo. Sed la "kvarpersona bando" plenenergie oponis kontraŭ tio kaj kulpigis nian popolon energie laborantan por socialismo pri "produktivismo" k. s. Ili forte subpremis la aktivecon de la amasoj. Nun post forigo de la ĝenado de la "kvarpersona bando", la popolo de nia lando denove komencis marŝi firmpaŝe kaj senĝene en efektivigado de tiu celo.

KONKURI EN LERNO DE DAKING

"Iru la vojon de Daking kaj faru Daking-an kontribuon" estas sonora slogano elmetita de la vastaj amasoj de laboristoj kaj oficistoj en modernigo de niaj agrikulturo, industrio, scienco, tekniko kaj nacidefendo.

Daking estas fama avangarda entrepreno sur la industria fronto de nia lando. Laŭ la linio kaj principoj elmetitaj de Prezidanto Maŭ pri administrado de socialismaj entreprenoj, Daking-anoj kreis nian propran vojon de disvolvado de industrio, kontraŭan al tiu de kapitalismo kaj reviziismo. Sur vasta stepo en la nordo ili konstruis grandan petrolkampon kaj dank' al tio nia lando ne plu dependas de importita nafto kaj eĉ povas iom eksporti nafton.

La movado de lerno de Daking en industrio komencita laŭ la alvoko de Prezidanto Maŭ en 1964 estis subfosita de Liu Ŝaŭki, Lin Biaŭ kaj precipe de la "kvarpersona bando". Post la frakaso de tiu bando, la vojo de lerno de Daking estas liberigita de la obstaklo. En printempo de la lasta jaro, Prezidanto Hua faris alvokon al la tuta lando en la senprecedence grandioza Tutlanda Konferenco pri Lerno de Daking en Industrio sub lia prezido: "Ni nepre alte tenu la ruĝan flagon de Daking starigitan de Prezidanto Maŭ." De tiam vigle disvolviĝas tra la tuta lando la amasa movado de lerno de Daking kaj konstruado de Daking-tipaj entreprenoj.

La Daking-anoj, kiuj neniam kontentiĝas je la atingitaj sukcesoj, marŝas fronte en tiu movado. Sub la direktado de Maŭzedongpenso, ili decidis surgrimpigi novajn altaĵojn. Samtempe kun serĉado de novaj pli profundaj olehavaj stratumoj en la ĉirkaŭaĵo de la olekampo, ili disvolvas socialisman konkurson tra la tuta olekampo por plenumi ĉiujn laborojn plibone. En la unua duonjaro de 1977, ili superis la plej


altajn nivelojn en la historio en produktado, prilaborado kaj transportado de nafto, en pumpado de akvo en olean stratumon, en livero de profito al la ŝtato kaj en la totala produktovaleco.


Ĉiuj provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj de la tuta lando prezentis diversmaniere al la amasoj la avangardan sperton de Daking kaj la grandiozan celadon de modernigo de niaj agrikulturo, industrio, scienco, tekniko kaj nacidefendo, kaj per tio forte stimulis ilin. La laboristoj kaj oficistoj de ĉiuj industriaj entreprenoj tuj ekagis kaj aperis ĉie vigla situacio de lernado de Daking, labora konkurso kaj antaŭentrebado.

Ĉinio estas lando de socialisma komuna posed-sistemo kaj ĝia disvolvado de produktado celas potencigon de la socialisma patrolando kaj feliĉigo de la tuta laboranta popolo. La komunaj celoj kaj interesoj ebligas la lernadon de Daking kaj disvolvon de socialisma konkurso, kiuj multe rapidigas la konstruadon dank' al reciproka lernado kaj akcelado.

En la pasinta jaro, socialisma labora konkurso disvolviĝis unue inter la du grandaj fervojaj burooj de Ĝengĝoŭ kaj Pekino. La Ĝengĝoŭ-a Fervoja Buroo situas en centra Ĉinio, tra kiu iras tri trunkaj fervojoj. Antaŭe pro interveno de la "kvarpersona bando", la linioj sub ĝia administrado ofte estis obstrukcatakaj, kio malhelpis la fervojan transportadon de duona Ĉinio, kaj pro tio ĝi fariĝis postiginta unuo fama tra la tuta lando. En la movado de malkaŝado kaj

Bonkvalita ŝtala materialo de la Anŝan-a Fera-Ŝtala Kompanio transportota aliloken





La Nankina PTT-Instituto sukcesis produkti televidfonon.

kritikado al la “kvarpersona bando” kaj en la movado de lernado de Daking, la laborantoj de tiu buroo elektis la avangardan Pekinan Fervojan Buroon kiel konkursan rivalon kaj rapide ŝanĝis la staton dank’ al reciproka helpado kaj lernado. La Pekina Fervoja Buroo daŭre marŝis en venko kaj kreis la plej altan nivelon de transportaj kvantoj de pasaĝeroj kaj varoj en sia historio. La ceteraj fervojaj burooj de la lando ĉiuj komencis lerni de ili kaj konkurso rapide envolvis la tutan fervojan branĉon.

Tuj sekvante tion la Ĉefurba Fera-Ŝtala Kompanio faris proponon de konkurso al la Anŝan-a Fera-Ŝtala Kompanio kaj ĉiuj aliaj metalurgiaj entreprenoj de la tuta lando, kaj en tiu branĉo disvolviĝis grandioza labora konkurso. En marto, la Ĉefurba Fera-Ŝtala Kompanio iris antaŭ la aliaj en efika utiligo de altfornoj kaj malmultigo de procentoj de uzata koakso; en aprilo, la Anŝan-a Fera-Ŝtala Kompanio superis ĝin; kaj en majo la Benhi-a Fera-Ŝtala Kompanio superis la Anŝan-an. En la unua kaj meza tagdekoj de junio la Anŝan-a kaj Ĉefurba Feraj-Ŝtalaj Kompanioj plirapidigis siajn paŝojn por kuratingi kaj superi la Benhi-an Fera-Ŝtalan Kompanion kaj la lasta daŭre antaŭenmarŝas modeste. Dank’ al tio ili ĉiuj ricevis novan progreson.

Iras konkursado ankaŭ inter provincoj kaj diversaj ministerioj. Dum la Tutlanda Konferenco pri Lerno de Daking en Industrio, kon-

kurso komenciĝis unue inter Siĉuan-provinco kaj Ŝandong-provinco kaj inter Hunan-provinco kaj Gjangsu-provinco. Baldaŭ ankaŭ aliaj provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj enviciĝis al la konkursantoj kaj ilia nombro atingis 26 je la fino de la lasta oktobro. La Petrolkemia Ministerio bone faris revolucigon al siaj administracioj, atingis grandajn sukcesojn kaj estis laŭdata de Prezidanto Maŭ. En la pasinta jaro la ministerioj de industrio kaj trafikado lernis de la Petrolkemia Ministerio kaj surbaze de tio disvolviĝis konkursoj inter ili.

Samtempe kun tio, inter urboj, subprovincoj, entreprenoj, laborejoj, fakoj, grupoj kaj personoj disvolviĝis konkursoj diversformaj laŭ iliaj karakterizoj kaj bezonoj en disvolvo de produktado kaj teknikoj. La vasteco de tiu aktivado kaj la grandnombro de ĝiaj partoprenantoj estas senprecedencaj.

La partoprenantoj de la konkursoj kaj rivalas kaj interhelpas unu alian. Ekzemple, dum konkursado, la Pekina Brakhorloĝa Fabriko senrezerve prezentis sian sperton de altigo de likimuneco de brakhorloĝoj al la Tiangin-a Brakhorloĝa Fabriko, kaj tiu ĉi lasta donis sian tutan projekton de nova virina horloĝo por helpi la fratan fabrikan multigi specojn de produktado. Ni donu ankoraŭ unu ekzemplon. La Ŝanhaja Unua Kemia Fabriko ricevis la taskon rafini novan specon de nafto, tamen ĝi ne povis solvi iajn malfacilojn en rafinado. La Pekina Petrolorefinejo Dongfanghong, kiu estis ĝia rivalo en konkurso kaj havis sperton en rafinado de tiu speco de nafto, tuj sendis koncernan materialon per gvidanta kadro.

Por ke la lernado de Daking kaj konkurso disvolviĝu bonefike, diversnivelaj gvidantaj kadroj partoprenis kiel ordinara laboruloj en produktado kun revolucia spirito de sinforĝesa laborado en la periodo de revoluciaj militoj. Kang Si-en, ministro de la Petrolkemia Ministerio, iris la unua kun 500 oficejaj kadroj al kelkaj olekampoj kaj kemiindustriaj entreprenoj por fari kontribuon en plenumo de la postulo de Prezidanto Hua konstrui dek grandajn olekampojn similajn al Daking en tiu ĉi jarcento. Ankaŭ grandaj nombroj da kadroj de la aliaj ministerioj kaj la

organoj de la provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj iris en bazajn unuojn por ilin helpi en laboro. Ĝaŭ Zijang, la unua sekretario de la kompartia komitato de Siĉuan-provinco, kaj aliaj kadroj iris en la bazajn unuojn, faris enketojn, kunvokis diversajn kunsidojn por elimini la venenajn influojn de la “kvarpersona bando” kaj la slogano “lernu de Daking kaj kuratingu Ŝandong” elmetita de la provinca kompartia komitato ĉiam pli profundigis en la koro de la popolo. Pro la terura subfosado de la “kvarpersona bando”, la totala industria produktovaloro de Siĉuan en 1976 malkreskis je 10 procentoj kompare kun tiu de 1975. En 1977, rimarkinde ŝanĝigis tiu stato. Ĝiaj 12 ĉefaj industriaj branĉoj de metalurgio, karbo, kemio, maŝinfarado, elektro-

niko kaj malpeza industrio produktis pli multe. Ekde aprilo, la totala industria produktovaloro de la provinco kreskadis senĉese. Tiu de la unuaj 10 monatoj pligrandiĝis je 34% kompare kun la sama periodo de la antaŭlasta jaro. La amasoj ĝoje diris, ke denove aperos granda antaŭensalto kiel en 1958.

La unuaj fruktoj akiritaj en la pasinta jaro multe fortigis la fidon de nia popolo pri modernigo de niaj agrikulturo, industrio, scienco, tekniko kaj nacidefendo kaj konstruado de socialisma potenco. Nun restas nur 23 jaroj de tiu ĉi jarcento. Nia popolo laboras pli diligente por realigi la deziron de la forpasintaj Prezidanto Maŭ kaj Ĉefministro Ĝoŭ.

Nova Fizionomio de la Pekina

Kemia Fabriko

de HIAŬ JUN

LA Pekina Kemia Fabriko en la orienta antaŭurbo de Pekino havas pli ol 3,000 laboristojn kaj oficistojn, kaj ĝia ĉefa tasko estas produkti diversajn altpurajn kemiajn reagilojn kaj materialojn. Lastatempe, kiam ni vizitis la fabrikon, en ĝi disvolviĝis socialisma laborkonkurso por turni ĝin en Daking-tipan entreprenon en unu jaro. En la lastaj jaroj ĝi ĉiam superplenumis la taskojn difinitajn de la ŝtato. Precipe post la frakaso de la “kvarpersona bando”, la vastaj amasoj de laboristoj kaj oficistoj laboras kun pli granda revolucia entuziasmo kaj plirapidigis siajn paŝojn de impetado.


ĈIUJ STREBAS ANTAŬEN

Ĝia dua laborejo estas unu el la laborejoj kiuj kompare frue disvolvis laborkonkurson. En la komenco de la jaro 1977, ili jam ekfaris konkurson pri dek ĉefaj normoj, nome: produktovaloro, produktokvanto, specoj, kvalito, konsumo, produktokosto, sekureco, ĉeestaj procentoj, produktiveco kaj bonstateco de ekipaĵoj. Poste, ili kompletigis la enhavon de la socialisma laborkonkurso per politika kaj ideologia laboro kaj konstruado, stilo kaj disciplino de laboraj grupoj. Nun ili konkuras pri nobla ideologio, bona

stilo, energieco, solidareco kaj kontribuo. En la fino de ĉiu monato, respondeculoj de sindikato de la laborejoj kaj laboristoj zorgantaj pri la laborkonkurso publikigas sur nigra tabulo ĉiujn ciferojn, kiuj povas montri atingojn de konkurso, kaj kune taksas la konkursajn erojn neesprimeblajn per ciferoj. Ĉiumonate la laborejo elektas ses avangardajn grupojn samtempe ilin honoras per rondira ruĝa flago. Laŭdataj en la kunveno de la laborejo estas tiuj grupoj, kiuj bone plenumis sian laboron, sed ne ricevis honoran ruĝan flagon. Tiamaniere do, ĉiuj kolektivoj kaj personoj en la laborejo estas komparataj pri lerno kaj laboro. Ĉiuj strebas antaŭen vigleplene en interlernado kaj interhelpado.

Laboristoj rakontis al ni multajn laŭdindajn aferojn kiel la jenajn: Por kontentigi produktan bezonon kaj havigi al si varman fonton iu grupo

Angulo de la Pekina Kemia Fabriko



mem konstruis en du frostaj tagoj konservejon de likvigita petrolo gaso. Alia grupo ĉiamaniere klopodis por mem fari sintezan krudan materialon por anstataŭigi la mankantan kaj krome utiligis senutilajn materialrestaĵojn de aliaj laborejoj. Dank' al tio ili ne nur superplenumis sian taskon, sed ankaŭ malaltigis la produktokoston.

La sindikata estro de la laborejo Liang Honglin, kiu akompanis nin, diris: Vidante tian ĝojigan scenon, oni tuj rememoras la tagojn en kiuj la "kvarpersona bando" faris furiozan subfosadon. En la jaro 1975, por pli rapide disvolvi la produktadon nia fabriko pliintensigis la riparadon de la ekipaĵoj. Tiam ĉiuj estis plenaj de revolucia energio, multaj kadroj kaj laboristoj meminiciate petis pliigi siajn deĵorfojojn kaj longigi la laboran tempon, kaj iuj laboras eĉ post sia deĵoro. Sed la "kvarpersona bando" freneze subfosis la revolucion kaj produktadon svingante klakon de opono kontraŭ "produktivismo" por uzurpi la gvidantecon de la Partio kaj la ŝtato. Kvankam tiam la bonega situacio estis premita, tamen la laboristoj de la fabriko batalis kontraŭ ilia subfosado kaj daŭre persistis en produktado. Post la venko super la "kvarpersona bando", ili rompis la spiritan katenon de la bando kaj aktive komencis socialisman laborkonkurson en la fabriko.

Je nia mencio pri laborkonkurso, laboristoj diris: "Prezidanto Maŭ ĉiam pledis por laborkonkurso. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, ni fariĝis mastroj de la ŝtato kaj laborkonkurso vaste disvolviĝis en la tuta lando. Ĉu en la komenca periodo de la Respubliko por restarigi la nacian ekonomion aŭ en la antaŭensalto de 1958, la laborista klaso de nia lando aktive disvolvis la laborkonkurson kaj faris grandan kontribuon por prosperigi la socialisman patrolandon sub la gvido de la Komunista Partio de

Ĉinio. Poste, pro malhelpo de Lin Biaŭ kaj la 'kvarpersona bando' la laborkonkurso estis ĉesigita." Nun socialisma laborkonkurso ĉie disvolviĝas arde kaj ja akiris unuajn sukcesojn. Same tiel estas la Pekina Kemia Fabriko. Depost komenco de la laborkonkurso ĝia dua laborejo ĉiunmonate superplenumis sian taskon kaj faris 180 grandajn kaj malgrandajn teknikajn renovigojn. Por rapide altigi la kulturan kaj teknikan nivelojn de laboristoj, la laborejo aktive preparas fondi teknikan kurson por ili. Dum la vizitado ni vidis, ke laboristoj konstruas klasĉambrojn en postlabora horo.

"PIONIRO DE KVALITO"

En koridoro de la Pekina Kemia Fabriko pendas portretoj de la avangardaj grupoj kaj personoj. Unu el la portretoj portas jenan klarigon: La analiza grupo de neorganikaj kemiaĵoj de la kvalitokontrola sekcio persistas en serioza observado de koncerna regularo kaj estas elektita kiel "Pioniro de Kvalitokontrolo".

Por garantii la produktajn kvanton kaj kvaliton de kemiaj reagiloj, racia regularo estas necesa. Tio ja estas simpla vero. Sed la "kvarpersona bando" rigardis kontroladon pri la kvalito de la produktaj kiel kulpon, asertante, ke la kvalitokontrola sekcio estas "organo por kateni la laboristojn", kaj ĝin nuligis. Poste, sub la gvido de la partia komitato de la fabriko, la laboristoj kaj oficistoj, spite la kalumniadon de la "kvarpersona bando", ne nur restarigis la sekcion, sed ankaŭ konstruis domon kun pli bonaj kondiĉoj por plenumi la kontrolan laboron. Ni tre interesiĝis pri la "Pioniro de Kvalitokontrolo" kaj vizitis la grupon.

La grupo kun 11 personoj kaj 19 instrumentoj respondecas pri kvalitokontrolado de pli ol 100 puregaj reagiloj de la tuta fabriko. En la hela kaj pura laborĉambro de la grupo estas orde metitaj diversaj instrumentoj. Super ĝia pordo pendas ruĝa silkflago kun la oraj vortoj "Pioniro de Kvalitokontrolo" kaj sur la muro estas algluita listo de la normoj de Daking-tipa entrepreno.

Huang Binĉu, teknikisto de la grupo kaj juna laboristo Ĝang Giuĉang entuziasme rakontis al ni: En la pasinteco iuj ekipaĵoj de la grupo ne


plene ludis sian rolon pro manko de laborantoj. Por pli bone servi al la produkto kaj kontentigi la bezonojn de la laboro la grupanoj disvolvis la movadon de "akiro de plurflankaj kapabloj krom majstreco en sia profesio" kaj nun ĉiu laboranto ne nur povas lerte manipuli sian instrumenton sed ankaŭ uzi aliajn instrumentojn. En la jaro 1977 la grupo akceptis urĝan taskon de mezurado kaj provado de iu altpura materialo, kiu devas enteni nur dekmiliononon da enmiksaĵo. Ĉiuj grupanoj plenenergie jetis sin en laboron, venkis multajn malfacilojn, helpis alian laborejon en difinado de teknologio, precize kaj akurate plenumis analizadon kaj provadon al 24 altpuraj materialoj kaj 274 specimenoj.

La membroj de la grupo ĉiutage mem venas al la laborejoj por preni specimenojn kaj sendi al ili analizajn raportojn kaj persone koni produktan teknologion, krudmaterialojn kaj ŝlosilajn problemojn de kvalito. Foje ili trovis, ke produktajo de iu laborejo enhavas tro multe da enmiksaĵo. Ili serĉis la kaŭzon kune kun laboristoj, fine ŝanĝis la malnovan ekstraktan metodon, kaj dank' al tio ili plenumis la taskon difinitan de la ŝtato.

La akompananto diris al ni: La avangardaj faroj de la grupo jam diskonigiĝis tra la tuta fabriko. Nun ne nur ĉiu laborejo havas specialan kontroliston de la produktaja kvalito, sed ankaŭ ĉiu laboristo konscie altigas kaj mem kontrolas la produktokvaliton. Kun la disvolviĝo de tio, ĉiam plifortiĝas la deziro de la laboristoj pli multe posedi teknikojn. Pro tio la fabriko plupaŝe fortigas sian gvidon al la Laborista Postlabora Universitato kaj la Postlabora Teknika Mezlernejo. Samtempe estas starigitaj postlaboraj fremdlingvaj kursoj de la angla, japana kaj franca lingvoj, en kiuj diligente lernas multaj laboristoj.

VIRINA GRUPO "LA OKA DE MARTO"

En la unua laborejo estas virina grupo "La Oka de Marto", kiu ĉiujare faras grandan paŝon antaŭen en produktado kaj estas fame konata avangarda produkta grupo de la fabriko. "La Oka de Marto" estas nomo ŝatata de la virinoj de nia lando. Ili fieras pro nomumo de sia grupo per la Internacia Virina Festotago.



Ekzameno de kvalito



La virina grupo "La 8-a de Marto" en politika lernado

Kiam ni venis al la grupo, la laboristinoj estis ĝuste en lernado. Informiĝinte pri nia intenco, la grupestrino Liaŭ Jilian bonvenigis nin en la nomo de la tuta grupo kaj konigis al ni ilian laboron. Liaŭ Jilian estis elmigrinta ĉino, kaj revenis al la patrolando en 1954. Ŝi aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio en 1974. Nun ŝi estas 43-jara. Ŝi diris: Prezidanto Hua alte tenas la grandan standardon de Prezidanto Maŭ kaj alvokis al ni lerni de Daking, kaj tio nin

multe kuraĝigis. Dank' al lernado ni plie komprenis, ke la Daking-anoj povis ses-oble pliiĝi la produktadon de sia olekampo en 17 jaroj kaj ĉiujare kreis por la ŝtato grandan kvanton de riĉaĵoj ĉefe pro tio, ke ili posedas Maŭzedongpenson kiel akran armilon por direkti sian batalon. Por respondi la alvokon de la partia filio de la laborejo "duobliĝi la produktokvanton", ni devas lerni kaj batali same kiel la Daking-anoj.

La ĉefa tasko de la grupo estas produkti tinkturan mordanton. Por altigi la produktivecon ili senĉese faras teknikan renovigon. Trovinte, ke iu produkta proceso estis tro longa kaj tio plilongigis la tutan produktan periodon, ili decidis reformi la proceson. Imitante Daking-anojn ili aparte atentis akumuladon kaj studon de primaraj materialoj kaj serioze ekzamenis pli ol 200 arojn da donitaĵoj de 1975 ĝis nun, ĉefe analizis la kaŭzojn de la malpli longa proceso de pli ol 10 fojoj kaj trovis metodojn por mallongigi la proceson. Poste, ili faris teknikan renovigon kaj sukcese mallongigis la produktan periodon de 24 horoj ĝis 5 horoj, kaj plenumis la tutjaran taskon en duonjaro.

Post tio la grupo akceptis alian taskon produkti korodimunilon. En la pasinteco oni neniam ĝin produktis, kaj pro tio multaj grupoj rigardis la aferon plej malfacila. Sed ili ne timis malfacilojn kaj firme kredis, ke se oni persistos en praktikado, ili certe povos trovi la produktan leĝon kaj sukcesu. En la unua monato, la kvalito de ilia produktaĵo ne atingis la postulatan normon. Tiam iu admonis ilin transdoni la taskon por teni sian honoron de la grupo. Ili firme respondis: "Ni neniam eĉ pensis pri redono de la akceptita tasko." Post pli ol 100 eksperimentoj ili fine posedis la teknikon kaj produktis bonkvalitan korodimunilon. La laborprodukteco senĉese altiĝis, kaj refoje ili plenumis la taskon antaŭdate.


La virina grupo estas antaŭen marŝanta. Ilia revolucia spirito profunde kortuŝis nin. Ni jam vidis en la grupo la venke antaŭenmarŝajn paŝojn de la laboristoj de la tuta kemia fabriko kaj la tuta lando.

(Fotoj de Hiaŭ Tiehan)


Nova Fizio- nomio de Industrioj de Siĉuan

La 7001-a Putobora Taĉ-
mento de Siĉuan sukcesis bori
puton kun profundeco de
7,058 metroj.

Sciencaj laborantoj kaj laboristoj de la
Petrola Buroo de Siĉuan-provinco aktive
faras sciencan esploron.



Nova kemisterka instalajo de
la Siĉuan-a Kemia Fabriko
kun projekta jara produkto-
kvanto egala al miliono da
tunoj da norma kemisterko



En la lastaj jaroj multe kreskis la produktokvanto de la Siĉuan-a Aŭtofabriko.






La Jibin-a Kemia Fabriko antaŭdate plenumis sian produktaĵon taskon difinitan de la ŝtato en 6 sinsekvaj jaroj.



65-tuna hidraŭlika pezleva aŭto farita de la Pezlevila Fabriko Ĉanggiang de Siĉuan-provinco

La Congking-a Elektrejo perfektigis diversajn regularojn kaj tio garantiis sekuran produktadon.




Ne plu plago de orientaj migrantaj lokustoj en Ĉinio

LA orientaj migrantaj lokustoj (*Locusta migratoria manilensis* Meyen) plagis nian landon dum miloj da jaroj. Nun la plago estas katenita kaj jam ne okazis ĉe ni en la lastaj dekelkaj jaroj.

Hodiaŭ en regionoj de la basenoj de la Flava Rivero kaj Huajhe-rivero, la antaŭaj famaj fontoj de tiaj lokustoj, ĉie vidiĝas forstozonoj kaj rizkampoj similaj al sternitaj tapiŝoj. La antaŭaj lokustaj fontoj jam fariĝis riĉaj lokoj. En la pasinteco, la inundiĝema areo de dekmiloj da hektaroj da tero ĉirkaŭ Vejŝan-lago en sudokcidenta Ŝandong-provinco estis unu el la fontoj de lokustoj, kiuj migradis kaj plagis plurajn provincojn. Nun tiu loko jam transformiĝis en vastan rizkamparon donantan riĉan rikolton kaj la diro "lokustoj kovras eĉ la ĉielon, kaj nenion restigas en la kampoj" jam fariĝis priskribo historia.

En nia historia literaturo oni notis pri plago de lokustoj jam en la jaro 707 a. K. Laŭ historiaj verkoj, en la pasintaj pli ol 2,600 jaroj post tiu tempo jam okazis pli ol 800 seriozaj lokustaj plagoj en nia lando, meznombro unu fojo en iom pli ol 3 jaroj. Ili estis plagoj kruelaj kaj teruraj. Pri iu lokusta plago en Tang-dinastio (618 — 907 p.K.) oni skribis jene: "En somero de la unua jaro de Ĝenjuan-periodo de Tang (785 p.K.), lokustaj nuboj flugis dum dek tagoj plene kovrante la ĉielon, de la maro en la oriento ĝis la regiono de la Flava Rivero en Long (nun Gansu-provinco), kaj ĉie, kie ili atingis, restis nek folioj de herboj kaj arboj, nek brutoj kaj la



Aviadilo disŝutas insekticidon.

vojoj estis ŝtopitaj de malsataj kadavroj." Notoj de Juan-dinastio (1206 — 1368 p.K.) tiel priskribas lokustan plagon en Ŝandong, Hedong, Henan kaj Guanĝong: "La flugantaj lokustoj kovris la ĉielon, irado de homoj kaj ĉevaloj estis barataj, kaj sulkoj kaj fosajoj kie ili falis estis plenigitaj." Iu poeto de Ming-dinastio (1368-1644 p. K.) tiel priskribis teruran lokustan plagon: "Lokustoj kovris la ĉielon kaj la suno paliĝis, surkampe maljunaj kamparanoj verŝis sangajn larmojn pro fatalo."

La reakciaj regantaroj de la dinastioj kaj la reakcia registaro de Kuomintango faris nenion kontraŭ la lokustaj plagoj, sed eĉ plipezigis sian ekspluatadon al la popolo. La laboranta popolo indigne nomis tiujn reakciajn regantojn lokustoj. Ekzemple, dum la periodo de la Kontraŭjapana

Rezistmilito, la popolo de Henan-provinco nomis Tang Enbo, lakeon de Ĉiang Kajšek, unu el la kvar plagoj de inundo, sekeco, lokustoj kaj Tang Enbo por la tiea popolo.


Post la Liberiĝo, sub la gvido de Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio, la popolo kaj sciencaj laborantoj de nia lando disvolvis amasan movadon kontraŭ lokustoj. En la regionoj de serioza lokusta plago ĝenerale fondiĝis stacioj por preventado, ekstermado, esplorado kaj raportado pri lokustoj kaj multaj sciencaj laborantoj faris enketadon kaj sciencan esploron pri lokusto dum amasa aktivado kontraŭ lokusta plago. En la jaro 1951, nia lando komencis disŝuti insekticidon kontraŭ lokustoj per aviadilo. Samtempe kun konstruado de irigacia sistemo en la regionoj de lokusta plago oni forigis iom post iom kondiĉojn por generado de lokustoj, tiel ke malgraviĝis aŭ malaperis la plagoj. La espero de la laboranta popolo en antikva Ĉinio "ekstermi fiinsektojn por protekti plantidojn" fine efektiviĝis en la socialisma epoko.

Kunlaborante kun la vastaj amasoj, la scienlistoj de la Pekina Zoologia Instituto de la Ĉina Scienca Akademio, la Plantoprotekta

Instituto de la Ĉina Agronomia Akademio, koncernaj altaj lernejoj kaj diverslokaj stacioj por preventado, ekstermado kaj anoncado pri lokustoj faris grandan klopodon en esplorado pri lokustoj kaj ilia ekstermo. Multaj sciencistoj longe laboradis en lokustaj regionoj por resumi sperton de la amasoj kaj sistemigis la esploradon pri ekologia geografio de la fontoj de lokustoj, pri la variado de geneza kvanto kaj ĝin influantaj faktoroj. Ili starigis observajn punktojn en gene-rejoj de lokustoj, faris diversajn eksperimentojn, akiris grandan kvanton da materialo pri la generaj karakterizoj de lokustoj ĉe bordoj de lagoj kaj maroj kaj en lokoj inunditaj, akiris bonan konon pri la influoj de inundo, sekeco, varmo kaj humideco al la genera kvanto de lokustoj, formis teorion pri ekstermado de lokustoj kaj trovis efikajn rimedojn kontraŭ ili. Ekzemple, oni altigis la akvonivelon aŭ transformis lagbordon en rizkampojn en la tempo de elkoviĝado de lokustaj ovoĵoj aŭ elmetis lokustajn ovoĵojn al arda sunlumo per profunda plugado por mortigi ilin, kaj ricevis bonan rezulton. Niaj sciencistoj jam skribis plurajn verkojn pri la sperto de ekstermo de lokustoj inkluzive de la libro «Pri la Ĉinaj Regionoj de Orientaj Migrantaj Lokustoj».



Lokustoj en aroj (en 1955)



Ruĝa flago starigita sur la Montpinto Tomur

de LIN JUN

JE la 15-a kaj 31 minutoj de la pekina tempo en la 25-a de julio, 1977, dek gesportistoj de la Ĉina Montgrimpa Trupo kaj unu fotografisto unuafoje sukcesis ascendi la plej altan pinton Tomur de Tianŝan-montaro en nia Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono. Ili estas Liu Daji, Kunga Pasang (tibetano), Vang Hongbaŭ, Daĉum (tibetano), Bienba (tibetano), Lozang Deĉing (tibetano), Ĉamco (tibetanino), Dobgial (tibetano), Jundron (tibetanino), Lu Giaŝeng kaj fotografisto Ŝi Hjuezeng.

La montpinto Tomur je 7.435.3 metroj alta super la marnivelo estas kruta kaj ĉiam kovrata de neĝo. Sur ĝiaj glaciaj kaj neĝaj deklivoj troviĝas multaj videblaj kaj kaŝitaj fendoj interkruciĝaj kaj nesondeblaj. Ĝiaj krutaĵoj, kanjonoj kaj neĝaj

muroj formas naturajn barojn. Sur ĝia suda deklivo dislokiĝas glacialaj regionoj. En printempo kaj somero ofte okazas lavangoj pezaj je miloj da tunoj kaj kune ruliĝas malsupren ŝtonoj kaj glacioj kun tondra bruado.

Je la 10-a horo antaŭtagmeze de la 25-a de julio, la montgrimpisto ekiris de la sturma kampadejo je 7.000 metroj alta super la marnivelo. Tiam neĝis, kaj la videbleco estis malbona. Pro malalta aero-premo, manko de oksigeno, kruta deklivo kaj profunda neĝotavolo, ili devis fari grandan penon por ĉiu paŝo. Tamen, firme tenante la komision de la Partio kaj la popolo en sia memoro kaj kun alta batalvolo, ili fine sukcesis ascendi la montpinton Tomur post 5 horoj kaj 31 minutoj plenaj de penado. Ili

tuj raportis tion al la bazo de la montgrimpa trupo.

La montgrimpisto starigis kvin-stelan ruĝan flagon kaj metalan termezuran rigardstangon sur Tomur, kolektis specimenojn de glacio, neĝo kaj roko, mezuris la dikecon de neĝotavolo sur la pinto kaj faris filmadon kaj fotadon. Ili restis unu horon kaj 18 minutojn sur la pinto kaj revenis sekure al sia bazo je la 17-a kaj 30 minutoj de la 28-a de julio.

Tomur en la ujgura lingvo signifas feran monton, kaj de antikveco ĝi jam estas teritorio de Ĉinio. Laŭ la notoj en niaj historiaj literaturoj, Han-dinastio (de 206 a.K. ĝis 220 p.K.) kaj Tang-dinastio (de 618 ĝis 907 p.K.) jam starigis reginstancon en la Hingiang-a regiono — antikve





Ripozo (foto de Ĉen Lejšeng)


nomata Okcidenta Regiono, nomis oficistojn al ĝi kaj starigis garnizonon laŭ la sistemo de garnizono agrikulturanta. De tiam la vastaj regionoj sude kaj norde de Tianŝan-montaro, oriente kaj sude de la lago Balkaŝo estis oficiale inkluditaj en la teritorion de la unueca multnacieca Ĉinio. Nia fame konata poeto Li Baj de Tang-dinastio naskiĝis en la urbo Cujje okcidente de Tianŝan. Multaj el liaj poemoj priskribas belajn pejzaĝojn de Tianŝan. Tiaj intimaj rilatoj inter la popoloj en la interna lando kaj en limregionoj daŭris seninterrompe tra la dinastioj Song (960-1279 p.K.), Juan

(1206-1368 p.K.) kaj Ming (1368-1644 p.K.). Dum King-dinastio (1616-1911 p.K.) la registaro nomis en 1762 militan kaj administran oficistojn, kies gubernio ampleksis la vastajn regionojn oriente kaj sude de Balkaŝo kaj Pamiron, kaj en 1884 oficiale starigis tie la provincon Hingiang.

Tomur restas solida akvokonservejo pro sia neĝo akumulata dum la tuta jaro kaj ĝia degelakvo formis la riveron Aksu, kiu irigacias la oazon Aksu kaj la agrikulturitan regionon Tarim. La riverbasena regiono ĉe la piedo de Tianŝan-

montaro prezentis alian scenon: Ĉie fluas degelakvo, prosperas floroj, herboj kaj arbaroj, paŝtiĝas gregoj de bovoj kaj ŝafoj. Tie laboras kaj vivas generacio post generacio la popolanoj de la naciecoj ujugura, kazaĥa, ĥalĥaza, hana kaj huja de nia lando. Ĉifoje, niaj montgrimpaj sportistoj ascendis Tomur kaj faris sciencan esploron pri ĝiaj glaciriveroj, hidrologio, geologio, biologio kaj aliaj. Tio havas gravan signifon por defendi la landlimon de la patrolando, disvolvi la industrian kaj agrikulturitan produktadon de la suda Hingiang kaj reformi dezertojn.





En la parko Juantoŭĝu

Antikva urbo en verdajoj

de HJUE ĈENG


EN komenco de printempo, ekĝermas la floroj kaj arboj de la antikva urbo Vuhi. Post nelonge, ĉie jam pompas verdajoj kaj ĉarmaj floroj en tiu urbo kun historio de pli ol 2,000 jaroj.

Vuhi situas apud la fame konata Tajhu-lago sur la delto de Jangzi-rivero. Ĝi estas riĉa kaj bela loko kun fekundaj kampoj, abunda pluvo kaj milda klimato.

Tamen, en la malnova socio, kiam la laboranta popolo suferis de manko de vestoj kaj manĝaĵoj, la bonaj naturaj kondiĉoj ne povis esti plene utiligitaj. Tiam, kreskis tre malmultaj arboj en Vuhi escepte en la kortoj de riĉuloj. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, la popolo de Vuhi plantis pli ol 200,000 arbojn. Nun arboj vice staras ambaŭflanke de la stratoj kaj ĉirkaŭ la novaj loĝejoj. Florbedoj estas konstruitaj sur la

ebenigitaj marĉoj kaj purigitaj ruinejoj. La loko kie troviĝas la loĝkvartalo de laboristoj Giankanghincun estis fetora rivereto en la malnova socio. Hodiaŭ, ĉirkaŭ ĝi estas vicoj da poploj. Ambaŭflanke de la vojoj estas vicoj da verdaj arbedoj. Floroj kaj arboj kreskas inter la domoj. Nun pli ol 40 tiaj loĝejoj sin trovas en la tuta urbo. Kröme, ankaŭ en ĉiuj fabrikoj, registaraj oficejoj kaj lernejoj oni plantis diversajn florojn kaj arbojn. Depost la lasta printempo, en la urbo oni plantis 45,000 arbojn kaj nove konstruis 34 florbedojn en la ĉefaj stratoj kaj placoj. La verdajoj ĉirkaŭ la domoj kaj tiuj en la stratoj beligas la urbon kaj freŝigas ĝian aeron.

Tajhu-lago kun areo de 2,200 kvadrataj kilometroj situas inter la provincoj Giangsu kaj Ĝegiang. Ĝi estas vasta akvujo bela. Post la Liberiĝo, la popola registaro laŭplane konstruis



En Hihuj-Parko

kaj riparis la pitoreskejon de Tajhu-lago. La antaŭaj konstruaĵoj estas riparitaj, la vojoj de ĉiuj ĝardenoj larĝigitaj, montgrimpaj vojoj konstruitaj, montoj verdigitaj kaj novaj portaloj, pavilonoj, kioskoj, hoteloj kaj tetrinkejoj aldonitaj. Ankaŭ sanatorioj por la laboristoj estas instalitaj. Tiu urbo fariĝis turisma kaj ripoza loko por vastaj popolamasoj kaj fremdlandaj gastoj.

Juantoŭĝu forme simila al testuda kapo kun krutaj rokmuroj estas la centro de la pejzaĝo de Tajhu-lago. Starante sur ĝi, oni povas vidi blankajn velojn glitantajn sur la glimanta akvo kaj Ĝongdu-monteton similan al smeralda telero en la nordo. Sur la Granda kaj Malgranda Kimontoj en la sudo novaj konstruaĵoj elrigardas en verdajoj. Pli sude estas la Monttrio vizaĝanta al Juantoŭĝu en la lago. Ili estas parto de la 72 montetoj de Tajhu-lago. La Monttrio havas tutan areon de 12 hektaroj. Dank' al la kulturado de arboj en multaj jaroj, ĝi pli verdiĝis jaron post jaro kaj ĉie kreskas pinoj, cipresoj, bambuoj kaj fruktarboj. Ĝi fariĝis nepre vizitenda loko por ekskursantoj. Kamarado Guo Mojuo skribis jenajn versojn pri ĝi:

*Rigardas foren mi sur alta domo:
Sur akvo kvazaŭ flosas la Monttrio,
ĉirkaŭe ludas la smeraldaj ondoj
de vasta la orŝaŭma idilio.*



Printempo de Tajhu-lago

*La Laborista Sana-
torio sur Gongdu-
monteto en Tajhu-
lago*



La Umea Ĝardeno situanta apud monteto interesas per sia originaleco. Frue en la fino de King-dinastio, tie konstruiĝis malgranda persika ĝardeno. En la jaro 1912, oni transformis ĝin en umean ĝardenon. Tamen, ĝi estis malgranda kaj nur unu specon de umefloro ĝi havis. Nun, ne nur plivastiĝis la ĝardeno, sed ankaŭ multiĝis ĝiaj umearboj ĝis pli ol 10,000 de dekoj da specoj, inkluzive de ruĝa, blanka, verda, inka kaj draka umeoj. Por ke la vizitantoj povu oportune rigardi umeflorojn, la laboristoj de la ĝardeno artisme aranĝis tri rigardejojn en ĝiaj supraĵoj kaj malsupraĵoj.

La fame konata antikva Hihuj-ĝardeno situas ĉe la piedoj de la montetoj Hi kaj Huj en antaŭurbo de Vuhi. En ĝi troviĝas “La Dua Fonto de la Mondo”, Hujŝan-templo, Giĉangjuan k.a. vidindaĵoj. Antaŭ la Liberiĝo, ĝi, kiel unu el la famaj historiaj lokoj en suda Ĉinio estis okupata de burokrataj kapitalistoj. Pro longtempa senriparado, ĝi jam tre kadukiĝis. Ekde la jaro 1952, la popolo de Vuhi grandskale forstumis, senĉese plibeligis la pejzaĝo-punktojn en la ĝardeno, aldonis multajn rigardindajn florojn kaj arbojn, kiel ekz. osmantojn, moso-bambuojn, kamforarbojn kaj abiojn, kaj zorgeme flegis la antikvajn arbojn kun aĝo de 500-600 jaroj. Jingŝan-lago en la ĝardeno estis fosita en la jaro

1959 inter la montetoj Hi kaj Huj. La ĝardenistoj zorge beligis la ĉirkaŭaĵon de tiu lageto. Ili plantis plorsalikojn sur la insuleto en ĝi, transplantis blankŝelajn pinojn al enfluejo de la lageto, nove kulturis pinarbaron sur la suda alta deklivo kaj per ĝi kovris la konstruaĵojn. Ŝtona arko kun la surskribajo “Jingŝan-lago” staras en floroj sur la norda bordo. Dank’ al la konstruiĝo de Jingŝan-lago unuiĝis la distrikto de amuza aktivado de monteto Hi kaj la distrikto de historiaj lokoj de monteto Huj kaj formiĝis pitoreskejo.

Nun ĉ. 6,700 hektaroj da montodeklivoj de la antaŭurbo de Vuhi estas jam verdigitaj. La forstokulturo akcelis la disvolviĝon de agrikultura produktado. En la pasintaj pli ol 20 jaroj, la popolo de Vuhi ne nur plivastigis kulturadon de arbaroj por ligno sur la bordo de Tajhu-lago, sed ankaŭ konstruis 8 fruktĝardenojn. En la lastaj jaroj, tiuj fruktarbaroj ĉiujare produktis pli ol 1,500 tunojn da persikoj, piroj, pomoj, mandarinoj ktp. kaj pli ol 200 tunojn da teo. Nun kvinonon de la tuta areo de la ĝardenoj de la urbo okupas moso-bambuoj, tearbetoj, osmantoj kaj diversaj fruktarboj. En la Umea Ĝardeno sola oni kolektis pli ol 1 tunon da freŝaj osmantfloroj en la lasta jaro. 70% de la totala enspezo de la Umea Ĝardeno konsistas el tiu per vendo de parfumoj, fruktoj k.s.

Grundologo Hoŭ

Guanggiong

EN kamparo de Siĉuan-provinco en sudokcidenta Ĉinio cirkulas rakontoj pri laŭdindaj faroj de grundologo Hoŭ Guanggiong kiu aktive laboras por disvolvi nian agrikulturon.

Li estas profesoro de la Sudokcidenta Agromonia Instituto kaj verkis la librojn «Klasifiko de la Ĉinaj Agrikulturaj Grundoj», «Grunda Fiziologio», «Nova Signifo de Grunda Fekundeco» kaj aliajn. En la lastaj jaroj li faris enketadon pri reformo de grundo, ordigo de akvoj kaj forstumado en Guanghan kaj aliaj gubernioj de Siĉuan-provinco por kolekti sciencan materialon necesan por altigo de agrikultura produkto. Poste li starigis eksperimentejon en Lianhe-brigado de Ĝengin-komunumo de Gianjang-gubernio por fari agronomian esploron kune kun tieaj kadroj kaj komunumanoj kaj akiris novan sukceson.

Antaŭ kvar jaroj kiam Hoŭ Guanggiong venis al la nomita brigado, li jam estis preskaŭ 70-jara. Konsiderante lian grandan aĝon tiam la gvidantoj admonis lin resti en la instituto por scienca esplorado, tamen li firmdecide petis permeson iri al kamparo por fondi eksperimentejon kune kun instruistoj kaj studentoj de la instituto. Li diris: “Ĝuste pro tio ke mi jam maljuniĝis, mi devas labori multe en miaj lastaj jaroj por konstrui la novan socialisman kamparon.”

Alveninte al la brigado li tuj entuziasme petis ke kadroj kaj komunumanoj de la brigado kaj

produktaj taĉmentoj elmetu demandojn kaj temojn por lia esploro. Post nelonge li starigis sciencsploran grupon kun partopreno de gejunuloj kaj veteranaĵ kamparanoj de la brigado. Ili faris eksperimentojn pri semoj, plantodenseco kaj sterkado de kotono, maizo, rizo kaj aliaj plantaĵoj. Krome ili faris eksperimenton de alterna plantado sur kampo kun areo de ĉ. 10 hektaroj.

Parto de la kampoj de la brigado kun malfekunda kaj kompakta grundo povas konservi nek akvon nek sterkon, kaj produktas malmulte. Hoŭ Guanggiong cerbumis tage kaj nokte por reformi ĝin kaj vizitis komunumojn kiuj atingis sukceson en reformo al grundo. Printempe de 1973, lia sciencsplora grupo provis reformi grundon jene: fosi kavojn ĉiun kun areo de 0.25 kvadrata metro kaj kun distanco de 0.5 metro inter ili, en ĉiu el ili semis 6-8 maizojn aŭ kotonojn kaj aldoni al ili organikan sterkon. Tiamaniere la kampo estis profunde plugita kaj sterko koncentre uzita. En la sekvanta jaro oni faris kavojn en la interspacoj. Post tri jaroj tiu kampo estas tute reformita kun ŝparo de laborforto, sterko kaj akvo. La eksperimento montris, ke la tiel reformita kampo povas produkti pli multe da maizo kaj kotono ol nereformita kun samaj kondiĉoj de akvo kaj sterko. Poste Hoŭ Guanggiong kompilis lernolibron kun 40 temoj pri fruktoj de la eksperimentoj kaj ilin konigis al amasoj. Helpate de li, scienca terkulturado

Bangong-lago




Sur la lago


Bangong-lago troviĝas en Ali-regiono de la okcidenta parto de la Tibeta Altebenajo. Ĝi kuŝas kvazaŭ longa peco de smeraldo en altaj montoj de la mondfamaj montaroj Karakorum kaj Ganggar-desi. Nebulo ŝvebas en la neĝkovritaj montoj kaj lazuraj ondetoj petolas en la pitoreska lago.

La lago longas ĉ. 155 kilometrojn kaj larĝas meznombre 2.4 kilometrojn. Ĝia areo estas 593.7 kvadrataj kilometroj. Ĝi troviĝas je 4,242 metroj super la mara nivelo. En ĝia ĉirkaŭaĵo kreskas tritiko kaj hordeo kaj krome estas vastaj bonaj gresejoj.


En la lago troviĝas insuloj sur kiuj nestas grandaj aroj de mevoj kaj sovaĝaj anasoj. Majo kaj junio estas tempo de ovometado kaj kovado por la birdoj kaj tiam sur la insuloj ĉie troviĝas birdaj nestoj kaj bruantaj birdoj. Ankaŭ en aliaj lagoj de tiu regiono troviĝas tiaj birdoinsuloj.



Ludo kun akvo



Flugado



Birdidoj



Paștejo apud la lăgo

estas vaste aplikata en Ĝengin-komunumo. Parto de la junuloj akiris multajn teknikojn kaj sper-ton pri alta kaj stabila produktado de kotono, maizo kaj du-rikolta rizo kaj estas nomataj "studentoj" kulturitaj de Hoŭ Guanggiong ekster la instituto.

Hoŭ Guanggiong faris sciencajn esplorojn pri grundo jam 40 jarojn. De post la Liberiĝo, li dediĉis sian tutan energion al disvolvo de la grunda scienco de la patrolando. Somere de 1975, li veturis per aviadilo de Ŝanhajo al Siĉuan. Survoje la aviadilo haltis en aerodromo de Ĉangŝa por ripozo. Liaj filino kaj bofilo laborantaj en Ĉangŝa kune kun sia filineto speciale venis al la aerodromo por vidi lin post multjara disiĝo. Ili sciis, ke la patro neniam permesis prokrasti laboron pro privataj aferoj, kaj ne kuraĝis inviti lin al si, ili nur kunportis al li iom da fruktoj kaj bombonoj kaj ilin metis en lian valizon. Pro-menante ekster la atendejo, Hoŭ Guanggiong rimarkis, ke ĉie estas humida grundo, sed nur tiu ĉirkaŭ la nove plantitaj kamforarboj estas tre seka kaj malkompakta. Li revenis al la atendejo, prenis el sia valizo la fruktojn kaj bombo-noj kaj anstataŭe plenigis ĝin per la grundo

ĉirkaŭ kamforarbo. La nepino mire demandis sian patrinon: "Kial avo prenis teron anstataŭ bombonojn?" La patrino ne sciis kiel respondi. La knabineto ja ne povis kompreni, ke por la avo bombonoj estas senvaloraĵo sed grundo estas trezoro!


Hoŭ Guanggiong ofte diris, ke lia labortempo daŭros nelonge, tial li devas perdi neniun minu-ton.

En aŭgusto de 1974, Hoŭ Guanggiong iris al gubernio Guanghan kun aro da studentoj sub sia gvido por fari ĝeneralan enketon pri grundo. Survoje ili renkontis longan pluvadon. Por laŭplane plenumi la taskon Hoŭ kaj liaj studen-toj daŭrigis iradon en pluvo anstataŭ atendi ĝis sereniĝo. Ili marŝadis sur kota vojeto, kaj kiam ili atingis la celokon Jongĝong-brigadon, iliaj vestoj tramalsekiĝis. Tion vidinte, kadroj kaj komunumanoj de la brigado forte kortuŝiĝis kaj tuj faris aranĝon por ke ili bone ripozu. Hoŭ tamen diris: "Ne hastu fari tion, sed prezentu al ni vian produktadon." Post tio li iris kun la studentoj al kampoj por esplori grundon. Li persone boris teron por preni specimenon kaj



Hoŭ Guanggiong ob-servas malfruan ri-zon.

Hoŭ Guanggiong lekcias pri grundologio.



klarigis al ili pri formiĝo de la grundo kaj sciigis al ili metodojn por ĝin reformi.


Dum la enketado en Hinfeng-komunumo Hoŭ ĉiutage laboris sub la arda suno kune kun siaj kamaradoj. Al la komunumo okazis maloftaj katastrofoj de hajlo en la lastaj jaroj. Por koni la kaŭzon ili kolektis kaj ordigis multajn koncernajn materialojn kaj fine ili trovis rimedon por preventi tian katastrofon.

Estante profesoro, Hoŭ Guanggiong tamen neniam montris grandsinjorecon kaj ĉiam modeste lernas de kamparanoj. Oni ofte vidis, ke li interparolas kun kamparanoj pri produkto ĉe kamprando. Iufoje li informiĝis, ke produkta taĉmentestro de iu komunumo nomata Giang Ŝiking estas sperta en kulturado de tritiko, kaj li iris por konsulti lin. Li ankaŭ invitis Giang Ŝiking al la brigado Lianhe por prezenti sian sperton. Poste li analizis lian sperton kaj konigis ĝin al aliaj produktaj taĉmentoj.

Dum la enketado kaj eksperimentado en kamparo, Hoŭ Guanggiong pli kaj pli bone vidis, ke la kamparanoj akumulis en produktado riĉan sperton, kiu pruvis, ke la grundologio strikte rilatas al plantologio. Li ne plu izole studas pri

grundo, sed ligas ĝin kun plantaĵo, klimato, semo, sterko, forstumo kaj brutobredado kaj serioze esploras iliajn interrilatojn. En la lastaj kelkaj jaroj li faris serion da studoj kune kun amasoj pri tio, kiel klimato ŝanĝas la staton de akvo kaj varmeco de grundo kaj kiel ĝi influas kreskon de plantaĵoj, kaj elmetis novajn vidpunktojn kun scienca valoro. En sia disertaĵo «Produkta Sperto de Kamparanoj Malfermis Larĝan Vojon por Disvolvi la Grundan Sciencon» li detale eksplikis siajn rezultojn de la studo kaj ricevis atenton de la sciencaj rondoj. Iuj komunumoj kaj brigadoj de Siĉuan direktis agrikulturan produktadon per lia nova teorio kaj akiris bonan rezulton. Laŭ propono de Hoŭ Guanggiong la Sudokcidenta Agronomia Instituto organizis parton da instruistoj de sep fakultatoj por pluaparte studi la rilatojn inter klimato, grundo kaj kresko de plantaĵoj.

Nun profesoro Hoŭ estas verkanta librojn «Pri la Ĉina Agrikultura Grundo» kaj «Grafikaĵoj de Agrikultura Grundo de Siĉuan-provinco». Li diris: «Kiel kompartiano mi kontribuis ne multe al la popolo. Mi nepre pli diligente laboros en la estonteco kaj dediĉos ĉion mian por disvolvi la grundologion de la patrolando.»



Feliĉaj horoj

de mongolnacieca soldatino

GIN HAJKING

ESTIS novembro de 1964. Tiam mi estis nur 8-jara. Kiel membro de la Delegacio de Artaj Amatoroj de Nacimalplimultoj de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio, mi venis al Pekino por partopreni en la Tutlanda Festivalo de Kantoj kaj Dancoj de Nacimalplimultaj Amatoroj. La tagoj rapide forpasis. Matene de la 24-a de decembro iu onklo de nia delegacio diris al mi: "Postmorgaŭ vi kantos por Prezidanto Maŭ. Li volas rigardi nian prezentadon." Kiel mi ĝojis pro tio! Mi ĉirkaŭbrakis la kolon de iu onklino kaj senĉese demandis: "Kiam venos Prezidanto Maŭ?" Kaj tuj poste mi turnis min al iu onklo kun demando: "Kiun kanton mi kantu por Prezidanto Maŭ?" Mi kuris en la ĉambron de Avo Memet de Hingiang, kiu havas pli ol 80 jarojn, kaj sciigis al li la plej ĝojigan novaĵon. La avo ĝoje ekludis dombron kaj diris al mi: "Dancu, mia infano." Laŭ la muziko de dombro, ĉevalkapa kordmuzikilo kaj surnao mi ekdancis andaj-dancon por esprimi koran amon de nacimalplimultoj al Prezidanto Maŭ kaj la Partio.

La tria posttagmeze de la 26-a de decembro estis la plej feliĉa tempo por ni. Prezidanto Maŭ, Ĉefministro Ĝoŭ kaj Vicprezidanto Ĝu De venis al la Popola Halo por rigardi nian prezentadon. La halo ekbolis de tondra aplaŭdado kaj hurado.

Komenciĝis la prezentado. Kun forta emociiĝo mi iris sur la scenejon de la Popola Halo kaj serĉis per soifa rigardo Prezidanton Maŭ. Jen, mi vidis lin, li sidis kontraŭ mi kaj ridetis al mi. Mi plengorĝe ekkantis:

*Super la Pekina ora monto,
Brilas l' orradia sun' en rondo —
Nia Prezidanto Maŭ la kara.
Kiel varma luma fonto,
Li heligas la korfundon de l' servutularo.
Marŝas ni feliĉe al la komunism-estonto.*

Poste mi kantis kelkajn aliajn kantojn en la mongola lingvo. Prezidanto Maŭ tre ĝojis kaj senĉese aplaŭdis al mi.

Post la prezentado, Prezidanto Maŭ, Ĉefministro Ĝoŭ kaj Vicprezidanto Ĝu volis akcepti nin. Ni atendis ilin en salono de la Popola Halo.

Alvenis Prezidanto Maŭ! Ektondris aplaŭdo kaj hurao. Mi staris en la unua vico, tamen mi ankoraŭ ekstaris sur piedpintoj kaj etendis la kolon por rigardi kiel eble plej bone kaj detale. Tiam iu gvidanto de la partia centralo portis min antaŭ Prezidanton Maŭ kaj Ĉefministron Ĝoŭ kaj prezentis min al ili: "Jen la 8-jara mongola aktorineto Gin Hajking, la plej juna aktorineto en la festivalo." Aŭdinte tion, Prezidanto Maŭ ameme prenis min en sian sinon kaj tiam mi ne sciis, per kiu vorto mi povas esprimi mian amon al Prezidanto Maŭ. "Ni infanoj de Interna Mongolio deziras al vi bonan sanon," mi diris la koran deziron rigardante lian afablan vizaĝon. Prezidanto Maŭ ekridetis, ekrigardis Ĉefministron Ĝoŭ kaj diris al mi: "Saluton al la infanoj de Interna Mongolio." Ho, Prezidanto Maŭ, kiel vi prizorgis la infanojn de Interna Mongolio! Ni infanoj de la nova Ĉinio feliĉe kreskas en via sino, kiel floroj disvolviĝas en brila sunlumo.

Prezidanto Maŭ iris antaŭen kaj mi sekvis lin per la okuloj. Tiam Ĉefministro Ĝoŭ salutis min ridetante. En emociiĝo mi diris ripetade: “Saluton, Ĉefministro”. Ĉefministro Ĝoŭ kuraĝigis min: “Bone vi kantis. Prikantu Prezidanton Maŭ, la Partion kaj socialismon.” Kvankam tiam mi ankoraŭ ne multe komprenis la revolucion veron, tamen mi bone sciis ke plej bona estas la Kompartio kaj plej kara estas Prezidanto Maŭ.

Prezidanto Maŭ kaj Ĉefministro Ĝoŭ jam paŝis antaŭen. Mi returniĝis kaj vidis, ke Avo Memet ankoraŭ aplaudis larmante, kaj liaj larmoj gutis sur lian veston. Mi ekmemoris, ke ankaŭ paĉjo

tiel larmis adiaŭante min en fervoja stacio. Li diris, ke mi transdonu liajn salutojn al Prezidanto Maŭ. Tiam mi ankoraŭ ne komprenis, kial paĉjo kaj Avo Memet larmis. Poste mi komprenis ilian koron: En mia aĝo paĉjo estis almozpetanta orfo; nun mi venis al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj estis akceptita de li. Kiel mal-samaj estas la nova kaj malnova socioj. Post la akcepto Prezidanto Maŭ, Ĉefministro Ĝoŭ, Viceprezidanto Ĝu kaj aliaj gvidantoj de la Centra Komitato estis fotitaj kune kun ni. Mi staris apud Prezidanto Maŭ kaj Ĉefministro Ĝoŭ kaj sentis senkomparan feliĉon kaj varmon. Mi kare konservas ĉe mi la foton kiu ĉiam kuraĝigas min en mia progreso.



SKRIBAĴOJ SUR OSTOJ KAJ TESTUDŜELOJ DE LA OKCIDENTA ĜOŬ-DINASTIO

Lastatempe oni trovis en Ĝoŭjuan de Ŝenhi-provinco nombron da altvaloraj ostoj kaj testudŝeloj kun gravuritaj vortoj de frua periodo de la Okcidenta Ĝoŭ-dinastio (1066 — 771 a. K.). Tiuj trovaĵoj prezentas materialon netroveblan en la historiaj libroj por esplori la politikon, ekonomion kaj kulturon de la frua periodo de la dinastio, la devenon de la Ĝoŭ-dinastia kulturo kaj la rilaton inter la kulturoj de la dinastioj Ĝoŭ kaj Ŝang (1711 — 1066 a.

K.). Ili estis trovitaj en kelo sub ruinaĵoj de palaco de la Okcidenta Ĝoŭ-dinastio.

Tiuj trovaĵoj nombriĝas pli ol 15,000 pecojn, inter kiuj estas pli ol 14,800 pecoj de geomanciaj testudŝeloj kaj pli ol 120 pecoj de geomanciaj ostoj. Laŭ unuapaŝa esploro iliaj enhavoj temas pri geomancioj pri kulto, vojaĝo, terkulturo kaj ĉasado, militado, rikolto kaj aliaj.

La formo de la ideografiaĵoj sur la ostoj kaj testudŝeloj montras altan lertecon de gravurado, do ili estas bona materialo por esplori la historion de gravurado de nia lando.

HOMA AKTIVADO ANTAŬ DEKMILOJ DA JAROJ EN TIBETO

En 1977, la Taĉmento de Sintezo Scienca Esplorado pri la Kinghaj-Tibeta Altebenaĵo sub la Ĉina Akademio de Sciencoj iris en la nordan Tibeton, trovis kaj kolektis en Nagĉu kaj Ali pli ol 250 pecojn da diversaj ŝtonaj iloj de antikvaj homoj. Tio pravas, ke frue antaŭ

dekmiloj da jaroj homoj jam aktivis en la vasta tibeta altebenaĵo.

Laŭ unuapaŝa ekspertizado, la trovitaj ŝtonaj iloj povas dividiĝi en du kategoriojn: Ŝtonaj iloj relative grandaj, inter kiuj sin trovas delikataj skrapiloj kaj pintaj iloj, eble apartenas al la malfrua periodo de paleolitiko; tipaj delikataj ŝtonaj iloj, inter kiuj estas malgrandaj il-ŝtonoj, skrapiloj kaj splitoj sen kunestantaj ceramikaĵoj, evidente apartenas al mezolitiko kaj la frua periodo de neolitiko. La formoj de la antaŭaj fundamente apartenas al la sama tradicio de la ŝtonaj iloj trovitaj en la baseno de la Flava Rivero. Kaj la lastaj havas intiman rilaton kun la samspecaj ŝtonaj iloj trovitaj en centra Ĉinio. Tio montras, ke la tibeta regiono de nia lando deantikve havas intiman kulturan rilaton kun la baseno de la Flava Rivero.

UTILIGO DE VIPURA VENENO

Sciencaj laborantoj de la Zoologia Instituto de Junnan-provinco faris

el vipura veneno fosfodiesteron urĝe bezonatan en biologia studo, samtempe ili sukcesis malkombini la venenan proteinion de vipura veneno per tripsino kaj malefikigi vipuran venenon. Tio malfermis novan vojon por utiligi vipuran venenon kaj kuraci vundon kaŭzitan de vipura mordo.

Ekstraktado de fosfodiestero el vipura veneno postulas altan teknikon. Samtempe kun lernado de progresiva tekniko fremdlanda, la sciencaj laborantoj klopodis por trovi novan propran vojon en preparado de fosfodiestero el vipura veneno de nia lando kaj trovis simplan kaj ekonomian metodon por produkti tiun substancon. Post ekspertizado koncerna fako konstatis, ke ĝia kvalito jam atingis la mondan nivelon.

SUKCESA BREDO DE HALIOTIDOJ

Nia lando sukcesis en bredo de haliotidoj kaj kreis per tio kondiĉojn por reprodukti tiujn moluskojn.

Haliotoj estas fame konata marproduktaĵo pro sia delikata kaj bongusta viando kaj uzebleco kiel grava drogo. La marbordaj provincoj Guangdong, Fugian, Tajvan, Ŝandong kaj Liaŭning de nia lando produktas ilin. Niaj esplora kaj produktaj fakoj de akvoproduktaĵoj unue eksperimentis pri bredado de idoj de buntaj haliotoj kaj akiris sukceson en tio. Surbaze de tio ili daŭrigis sian bredan eksperimenton al suĉilaj haliotoj. Ili sukcesis sinsekve elkulturi preskaŭ dekmilon da haliotidoj. Nun, la breditaj haliotidoj de la unua generacio ne nur bone kreskas, sed ankaŭ generis idojn ĉe marbordo de Fugian post dujara bredo.

PONTO ELTENINTA FORTAN TERTREMOM

La uzado de la ponto de 40-metraj spanoj el segmentaj antaŭstreĉitaj ferbetonaj kestotraboj de la Tiangin-Pukoŭ-a Fervojo super la rivero Zija pruvis, ke la projekto kaj konstruado de ponto estas sukcesaj.

La ponto estis konstruita laŭ kunaj esploro kaj projektado de la fervojkonstrua fako, fervoja instituto kaj pontotraba fabriko. Al la ponto aplikigis strukturo de segmentaj antaŭstreĉitaj ferbetonaj kestotraboj, kiuj estis faritaj en fabriko kaj kunigitaj en la konstruejo. Ĝi konsumis malpli da ŝtala materialo ol ordinara fervoja ponto, ĝia transversa kaj vertikala forteco estas pli granda kaj taŭgas por rezisti kontraŭ tertremo kaj rapida veturado. En 1976, post kiam tiu ponto estis malfermita al trafiko, forta tertremo okazis en la regiono Tangŝan kaj Fengnan. La ponto eltenis tiun provon kaj neniom deformiĝis.

ULTRASONA DIFEKTOSONDILLO

Ultrasona dek-kanala difektosondilo kun avangarda nivelo estas sukcese farita de la Ŝantoŭ-a Fabriko de Elektronikaj Instrumentoj de Guangdong-provinco kaj pogrande produktata.

Sondado pri difekto interne de materialo per ultrasono estas nova tekniko. La antaŭe uzitaj ultrasonaj difektosondiloj estis plejparte unukanalaj, kiuj povis ekzameni per unusola serĉpinto nur malgrandan areon kaj devis esti manipulataj permane.

La difektosondilo kun dek serĉpintoj povas ekzameni pli grandan areon samtempe. Ĝi povas aŭtomate sendi la ekzamenatan materia-

lon en la ekzamenilon, fari alarmon kaj marki la lokon de difekto per ruĝa lako kaj elmeti aparte la difektajn pecojn. Ĝia efikeco estas 30-oble pli alta ol tiu de la malnovaj aparatoj.

NOVA ELTROVO EN CITOGENETIKA ESPLORO

Plurjara kuna esplorado de la ĉina biologo Tong Diĝoŭ kaj lia esplora grupo kaj la usonaj sciencistoj Man-Chiang Niu kaj lia edzino pruvis, ke la komunika ribonuklea acido en la citoplasmo ludas rimarkeblan rolon en la evoluo kaj heredado de animaloj. Ili ankaŭ konstatis, ke la deoksiribonuklea acido en la ĉela nukleo ludas induktan rolon en la evoluo kaj heredado de la animaloj de malproksimaj rilatoj. Per tiuj sukcesoj ili faris novan kontribuon al citogenetiko kaj tiuj fruktoj de scienca esploro havas gravan signifon por la disvolviĝo de agronomio kaj medicino.

NACIMALPLIMULTAJ PARAŜUTISTOJ

La unua generacio de nacimalplimultaj paraŝutistoj de la aera armeo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo estas en kreskado.

En la komenco de 1974, la paraŝutista trupo de ĈPLA decidis varbi la unuajn nacimalplimultajn paraŝutistojn kaj niaj nacimalplimultoj faris solenajn ceremoniojn por elekti eminentajn junulojn por la armeo.

Veninte en la trupon, la junaj batalantoj de la naciecoj ujgura, kazaĥa, ĥalĥaza, siboa, mongola, tata, manĉura kaj huja diligente sin ekzercadas kaj klopodas por surgrimpigi novan altan pinton de tekniko por defendi la patrolandon.

Bona kuracistino

SUR la fervoja linio de 4,000 kilometroj administrata de la Cichara Fervoja Buroo en nordorienta Ĉinio cirkulas rakontoj pri faroj de kuracistino Vang Ŝuĉun, kiu tutkore servas al pacientoj.

En 1956, Vang Ŝuĉun venis al la Hajlara Hospitalo dependa al la fervoja buroo, kaj tie ŝi laboris kiel flegistino kaj ĉefflegistino, kaj poste ŝi fariĝis ĉinmedicina kuracistino. Lastatempe ŝi estis elektita kiel vicestro de la revolucia ko-

mitato de la hospitalo. Kelkfoje ŝanĝiĝis ŝia laborposteno, tamen ŝi ĉiam diligente laboris en la pasintaj 20 jaroj.

“Tio estas mia devo”

En iu aŭtuna tago fileto de malpli ol 1 jaro de laboristo Van Ĝaŭming suferis de pulmito kaj devis enhospitaliĝi. Tiam li estis plene okupita de laboro kaj lia edzino malsaniĝis, kaj ambaŭ ili ne povis iri prizorgi sian fileton en la hospitalo.

Vang Ŝuĉun, flegistino de pediatrio, konsolis lin dirante: “Majstro Van, vi trankviliĝu! Lasu nin zorgi ĝin.”

Ĉiutage Vang Ŝuĉun prenigis al la malsanuleto medikamentojn, nutris lin per bovinlakto kaj lavis liajn urintukojn.

Malvarmiĝis vetero, kaj la infaneto ankoraŭ ne estis en vatita vesto. Vang Ŝuĉun do vestis lin per la nova vatita vesto de sia infano kaj lavis por li vatitan litkovrilon kaj krome metis en ĝin dikan tavolon da nova vato.

La pacienteto resaniĝis. Van Ĝaŭming venis al la hospitalo por repreni la fileton. Vidinte la fileton en nova vesto, kaj informiĝinte, ke la vesto estis donita de Vang Ŝuĉun, li kortuŝiĝis ĝis larmo.

Vang Ŝuĉun firme tenas en la koro la instruon de Prezidanto Maŭ “**kompleta sindono al aliaj sen ajna konsidero pri si mem**” kaj observas ĝin en la agoj. Kiam grava malsanulo bezonis san-

Vang Ŝuĉun iras al rondira kuracado.



goperfuzadon, ŝi senprokraste sin anoncis por oferi la sangon, kaj tion ŝi faris jam sesfoje.

En vintro de 1976, la Hajlara Filia Fervoja Buroo faris sturman transportadon, kaj la laboristoj montris grandan entuziasmon en tio. En iu nokto la temperaturo abrupte falis, kaj neĝeroj kirliĝis en tranĉa vento. Iuj laboristoj malvarmumis, aliaj estis reatakataj de traĥeito kaj triaj ekhavis perniojn je la manoj aŭ vangoj. Kiel ili deziris kurachelpon!

Ĝuste tiam Vang Ŝuĉun, kiu ĵus finis sian labordejon en la hospitalo, venis inter la laboristojn kun medikamenta kesto, malgraŭ neĝo kaj vento. Ŝi iris de la ekspedejo al la transŝarĝejo kaj de la riparejo de vagonoj al la stacio, por pridemandi la farton de la laboristoj kaj doni ĝustatempan kuracon. Kvankam la vetero estis tre malvarma, tamen ŝi ŝvitegis de laboro.

Jam estis la naŭa horo vespere. La deĵoranta ekspedisto de la stacio Giang Jaŭtang denove suferis de hipertensio kaj stomaka malsano, kaj ŝvite sidis kurbigante sian korpon al la tablo. Ĝuste tiam Vang Ŝuĉun enpaŝis en la ĉambron, elprenis botelon da medikamenta dekoktaĵo el la poŝo kaj donis al Giang Jaŭtang.

Majstro Giang miris kaj demandis: "Kiel vi scias ke mi malsaniĝis?"

Vang Ŝuĉun diris: "Hieraŭ mi jam trovis vian sangopremon ne normala. Alvenas malvarma aerfluo kaj via malsano certe turmentas vin pro la ŝanĝiĝo de temperaturo. Mi preparis por vi kelkajn dozojn kaj ĉiutage portos al vi la dekoktaĵon." Preninte la botelon de medikamento, Majstro Giang nenion povis diri pro kortuŝiĝo.

La sturma transportado daŭris 113 tagojn, kaj Vang Ŝuĉun iris tien en 113 postlaboraj noktoj. Multaj malsanuloj dankis ŝin, kaj ŝi ĉiam modeste diris: "Tio estas mia devo, kaj mi bedaŭras, ke mi faris ankoraŭ ne bone."

Kuraci malsanulojn en ilia hejmo

Iuj el la malsanuloj, kiuj ofte vizitas Vang Ŝuĉun, estas maljunaj suferantoj de kronikaj malsanoj. Kelkaj el ili loĝas malproksime de ŝi aŭ iras malfacile. Vang Ŝuĉun pensis, ke estas pli



Helpi pacienton preni medikamenton



Preparado por perfuzo

oportune doni kuracadon en iliaj hejmoj. Ŝia propono estis aprobita de la gvidantoj de la hospitalo. En la lastaj kelkaj jaroj, ŝi seninterrompe vizitis pli ol 170 pacientojn en ilia hejmo en postlaboraj horoj.

En neĝaj kaj ventaj tagoj la malsano de pacientoj de traĥeito aŭ pulma emfizemo pli graviĝas, en sinsekvaj pluvaj tagoj pacientoj de reŭmatismo aŭ artrito suferas pli da doloro, kaj tiam ŝi ĉiam vizitas tiujn antaŭ ol aliajn malsa-

nulojn. Ju pli malbona estas la vetero, des pli granda estas la zorgo de Vang Ŝučun por la malsanuloj.

Edzino de laboristo Kang Ŝikun suferis de ftizo kaj bezonis akuratan injektadon. Tial ĉiumatene, antaŭ ol fari mastrumadon, Vang Ŝučun unue iris al Kang Ŝikun por fari al ŝi injektaĉdon; vespere, post labordeĵoro, antaŭ ol hejmenreveni, ŝi unue iris vidi ŝin. La vizitado neniam estis interrompita eĉ de granda vento kaj pluvo.

Iom post iom mildiĝis la malsano de Kang Ŝikun, tamen Vang Ŝučun malgrasiĝis pro lacego. Kang Ŝikun tre maltrankviliĝis kaj petis ŝin ne plu viziti ŝin, iam ŝi eĉ fermis al ŝi la pordon. Malgraŭ tio Vang Ŝučun ĉiam insistis ke ŝi malfermu la pordon.

Pasis tri jaroj. Neniu sciis kiom da fojoj Vang Ŝučun faris injektadon al Kang Ŝikun kaj kiom da noktoj ŝi flegis la pacientinon ĉe ŝia lito.

Dank' al la zorgema kuracado kaj flegado de Vang Ŝučun, Kang Ŝikun, kiu dum longa tempo ne povis elpaŝi el la pordo, jam povas labori en kampo. Ŝi ofte diris: "Se ne estus kuracistino Vang, mi jam mortus antaŭlonge."

Por interesoj de la popolo

Vang Ŝučun naskiĝis en familio de malriĉa kamparano. Kiam ŝi estis tri-jara ŝia patro mortis kaj ŝia patrino kun ŝi devis sin vivteni per almozetado. Rememorante la klasajn suferojn en la malnova socio, ŝi ĉiam tenas en la koro la laborantan popolon. Ŝi persistas en lernado de verkoj de Prezidanto Maŭ kaj ĉerpis el tio kuraĝigon kaj forton. Ŝi multfoje legis la verkon «Memore al Norman Bethune» kaj la brila figuro de la internaciisma batalanto Bethune profunde gravuriĝis en ŝia koro. En la ceremonio por aliĝi al la Kompartio, ŝi ĵuris sub la partia standardo: "Mia tuta vivo estas en dispono de la Partio. Por la afero de la Partio kaj por la klasaj fratoj, mi nenion domaĝos."

En ĉiutaga laboro ŝi serioze plenumas sian ĵuron.

Iun tagon de decembro de 1975, bopatro de Vang Ŝučun mortis en hospitalo pro malsano.

Ĝuste kiam ŝi kaj ŝiaj familianoj estis okupataj de funebraj aferoj, oni sciigis ŝin, ke du laboristoj grave vundiĝis kaj bezonis urĝan savadon. Vang Ŝučun tuj turnis sin kaj ekkuris eksteren. Ŝia bofratino kaptis ŝin dirante: "Bofratino, ne foriru! Ĉu vi povas lasi la patron sen zorgo?" Vang Ŝučun diris: "Ĉi tie mi estas bezonata, tamen savo al vunditoj estas pli grava."

La du vunditoj devis resti en hospitalo por senprokrasta kuraco, sed restis nur unu vakanta lito en la ĥirurgia malsanula ĉambro. Tiam edzo de Vang Ŝučun estis en la hospitalo por ricevi kuracadon. Ŝi do venis al li kaj admonis lin reveni hejmen portempe por cedi la liton al la vundito. Ili geedziĝis jam pli ol dek jarojn kaj la edzo plej bone konas Vang Ŝučun. Li tuj konsentis la proponon de la edzino kaj diris: "Ŝučun, vi prave pensas kaj faru laŭ via opinio."

En tiu vespero, anstataŭ reveni hejmen post sia laboro Vang Ŝučun iris viziti pacientojn same kiel antaŭe.

Alifoj, malvarmega aerfluo atakis la urbon Hajlar. Pro abrupta malaltiĝo de temperaturo, Vang Ŝučun eksuferis de tonsilito kaj traĥeito, kaj ankaŭ liaj filino kaj filo malvarmumis. La gvidanto de la hospitalo konsilis al ŝi ripozi, tamen pensante ke en tia vetero malsanuloj certe plimultiĝos, ŝi iris labordeĵori, kaj antaŭ foriro ŝi mezuris korpan temperaturon de la gefiloj, preniĝis al ili medikamentojn.

Tiutage, malgraŭ sia malsano ŝi zorgeme servis al la pacientoj. Post laboro ŝi denove iris al la loĝkvartalo de laboristoj por doni kuracadon. Tie ŝi servis ĝis la 11-a horo nokte. Reveninte hejmen ŝi sciis ke dum ŝia foresto ŝiaj gefiloj febrigiĝis kaj najbaro portis ilin en hospitalon. Karasante la infanojn ŝi diris: "Ne estas tiel, ke via panjo ne amas vin, ĉar la malsanoj de aliaj estas pli gravaj ol viaj."

La oficistoj kaj laboristoj ĉiuj laŭdas Vang Ŝučun pro ŝia tutkora servado al malsanuloj.

Lastatempe la Cichara Fervoja Buroo honoris ŝin per la titolo "kuracistino tutkore servanta al la popolo" kaj alvokis medicinajn laborantojn kaj laboristojn kaj oficistojn lerni de ŝi.




Vojkruco de Ŝigiaĝuang

Ŝigiaĝuang, ĉefurbo de Hebej-provinco

Ŝigiaĝuang situas sur la okcidenta parto de la ebenaĵo de centra Hebej. Tiu nova urbo havas historion de 70 jaroj kun iom pli. Antaŭe tie loĝis nur 8 familioj, sed nun ĝi jam fariĝis politika, ekonomia kaj kultura centro de Hebej-provinco kun pli ol 800,000 loĝantoj. Ĝi estas unu el la gravaj trafikaj nodoj kaj kruciĝas ĉe ĝi la Pekin-Kantona, Ŝigiaĝuang-Tajjuan-a kaj Ŝigiaĝuang-Deĝoŭ-a Fervojoj. En la urbo troviĝas la tomboj de la grandaj internaciismaj batalantoj N. Bethune kaj Kotnis kaj la Hospitalo Paco fondita de D-ro N. Bethune.



En ia malnova socio, pro regado de la Kuomintang-reakciularo kaj japanaj agresantoj, la industrio de Ŝigiaĝuang estis tre postĝinta, ĝia komerco baraktis en depresio, ĝiaj aliaj aferoj agoniis kaj ĝia popolo vivis mizerege.



Laborejo de la Dua Kotontekstila Fabriko


Laboristinoj interŝanĝas sperton



Post la Liberiĝo, rapide disvolviĝis la industriaj branĉoj de tekstilado, maŝinfarado, kemio, fero, ŝtalo kaj elektro. Pro la situo en fama kotona regiono, ĝi nature fariĝis unu el la bazoj de kotona industrio de nia lando. La produktovaloro de kotona industrio konsistigas trionon de la totala industria produktovaloro de la urbo. Ĝiaj 10 grandaj kaj mezaj ŝpinaj, teksaj, trikaj kaj tinkturaj fabrikoj estas plejparte ekipitaj per maŝinoj

Ŝtofoj








faritaj de Ĉinio. La produktokvanto de kotona fadeno de tiu urbo kreskis pli-ol-centoble kompare kun tiu de la komenca periodo post la Liberiĝo kaj tiu de kotona ŝtofo kreskis pli-ol-ducentoble. Nun milojn nombras la specoj de kotonaj kaj kemifibraj ŝtofoj, trikajoj kaj felpo. En 1977, ĝi plenumis, je 67 tagoj antaŭdate, la taskojn difinitajn de la ŝtata plano kaj produktokvantojn de 19 ĉefaj specoj de produktajoj inkluzive de tinkuritaj ŝtofoj, ŝtalajoj, aŭtoj, kemisterko kaj semmaŝinoj.

Kun la rapida disvolviĝo de industrio, senĉese pliboniĝas la vivo de ĝia popolo. Ĝia aĉetpovo multe grandiĝis. La valoro de la detalitaj varoj de la socio en 1976 estis duoblo de tiu en 1965 kaj 9.9-oblo de tiu en la komenca periodo post la Liberiĝo.

La tekstila kvartalo




Fosiliaj prahomoj lastatempe trovitaj




La loko de prahoma kulturo de Hjugiajaŭ

Ĉinio refoje trovis fosiliajn prahomojn antaŭ 100,000 jaroj kaj ilian vivlokon. Tia prahomo estas nomita Hjugiajaŭ-homo. La malkovrita vivloko de tiaj prahomoj de paleolitiko troviĝas en la okcidenta kruta muro de profunda ravino inter Hjugiajaŭ-brigado de Guĉeng-komunumo de Ŝanhi-provinco kaj Hoŭgiajaŭ-brigado de Dongginggi-komunumo de Hebej-provinco, kovrate de 8-metra tavolo de grizverda sableca argilo.


Stonbuloj uzitaj de Hjugiajaŭ-homoj en ĉasado




Fosilio de maksilo de prahomo



Fosilio de okcipitalo de prahomo (ekstera flanko)



Fosilio de dekstra parietalo de prahomo (ekstera flanko)



KE MING:

Ĉen Ĝingjun inter elementaj lernantoj

LA aŭtuno de Pekino estas serena kaj milda. En la antaŭtagmezo de la 12-a de la lasta oktobro, Ĉen Ĝingjun, la fama matematikisto de Ĉinio, esploristo de la Matematika Instituto de la Ĉina Akademio de Sciencoj, venis al la Unua Eksperimenta Elementa Lernejo por intervidiĝi kun ties lernantoj. En korto de la lernejo pendis du grandaj okulfrapantaj horizontalaj rubandoj kun sloganoj “Diligente lernu kaj marŝu al sciencoj” kaj “Lernu sciencojn, ŝatu sciencojn kaj uzu sciencojn!” La geknaboj en puraj vestoj kaj kun ruĝa tuko sur la kolo svarmis ĉirkaŭ

onklo Ĉen Ĝingjun kaj konkure manpremis kun li.

Ĉen Ĝingjun ĝoje demandis al iu apuda lernanto: “Kiom da jaroj vi havas?” La lernanto respondis: “Dek du.”

Ĉen Ĝingjun kortuŝite diris: “Kiel feliĉaj vi estas! Kiam mi estis 12-jara, iris ĝuste la Kontraŭjapana Rezistmilito, kaj la popolo vivis tre mizere pro fluga altiĝo de la prezo.”

Li daŭre demandis al la geknaboj: “Kial vi lernas matematikon?”



*Ĉen Ĝingjun inter
geknaboj*

Iu lernantino respondis: “Por konstrui la socialisman patrolandon.”

Alia lernanto sekvis: “Por efektiviĝi modernigon de la agrikulturo, industrio, nacidefendo kaj scienco kaj tekniko.”

Ĉen Gingjun kontente kapjesis dirante: “Prave, prave! Ni devas lerni matematikon kun ĝusta celo por glorigi la patrolandon kaj la popolon.”

Kiam Ĉen Gingjun demandis al la lernantoj kio estas malamiko en lernado de matematiko, la lastaj samvoĉe respondis: “Preteratentemo.”

Ĉen Gingjun tre kontentiĝis pri la respondo kaj klarigis al ili la malutilecon de preteratentemo per facile komprenebla lingvo. Li diris, ke sciencoj postulas precizecon kaj striktecon. Se oni erare kalkuladas pro preteratentemo, do la pafita tersatelito devias de orbito kaj ne povas esti reprenita.

Meditinte momenton Ĉen Gingjun demandis: “Kion viaj instruistoj faras dum vi ripozas?”

La geknaboj respondis: “Ili preparas lekciaĵojn kaj korektas por ni hejrnajn ekzercojn.”

La matematikisto daŭrigis: “Jes! Kiel diligentaj estas instruistoj. Ni devas estimi ilin. La ‘kvarpersona bando’ malice venenis la rilaton inter instruistoj kaj lernantoj kaj instigis geknabojn fuŝlerni. Ni ĉiuj lernantoj devas klopodi por atingi la plej bonan sukceson en ekzamenado, diligente lerni kaj posedi sciencajn sciojn por servi al la popolo.”

Dum la aŭdiencado, Ĉen Gingjun multfoje emfazis ke oni devas pagi penegajn laborojn por posedi matematikan scion. En la komenco matematiko ŝajne estas malfacile lernebla, tamen post diligenta lernado kaj ripetada ekzercado ĝi prezentas sin ne tiel malfacila por lernantoj. Li diris: “Sub la gvido de Prezidanto Hua la sciencaj aferoj de nia lando nepre prosperos. Post dudek jaroj, iuj el vi certe atingos kaj superos nin kaj la matematikistojn de la maljuna generacio.”

Li Ŝanggie, laboranto de la Matematika Instituto, kiu venis al la lernejo kune kun Ĉen Gingjun, rakontis al la lernantoj, kiel Ĉen Gingjun

diligente studas pri matematiko. En la komenco de la fondiĝo de la nova Ĉinio, kun celo kontribui sian forton al konstruado de la patrolando, Ĉen Gingjun venis al la Matematika Fakultato de la Hiamen-a Universitato. Dank’ al sia diligenteco li akiris eminentan sukceson en la lernado. En 1953, 20-jara Ĉen Gingjun finis sian studon en la universitato kaj estis restigita tie por laboro. Dum la laborado, li ekhavis grandan intereson por teorio de nombroj kaj legis koncernajn verkojn de ĉinaj famaj matematikistoj. Li decidis esplori Goldbach-konjekton, la nesolvitan problemon de la mondo, nome, konjekton elmetitan de germana matematikisto Goldbach antaŭ pli ol 200 jaroj, ke ĉiu ajn parnombro montras sumon de du primoj (simple nomita unu plus unu). Post persistema klopodado li fine akiris unuapaŝan esploran sukceson en 1966 kaj estis alte taksita de matematikaj rondoj en- kaj eksterlandaj. De 1956 ĝis nun Ĉen Gingjun publikigis pli ol 40 disertaciojn. Baldaŭ li publikigos tri disertaciojn kaj liaj aliaj tri disertacioj estas en verkado. Li estas tre okupata kaj eĉ laboris tutan nokton antaŭ veno al la lernejo. Sed pensinte pri espero de la lernantoj li forlasis ripozon kaj venis al la lernejo por intervidiĝi kun ili.

Aŭdinte tion, la lernantoj varme manklakadis por esprimi dankon al li.

Li Ŝanggie daŭrigis sian paroladon: Ĉen Gingjun ofte faras sciencan esploradon eĉ tutnokte. Nokte, kiam venis al li en la kapon utila elpenso, li tuj ellitiĝis por operacii. Foje li suferis de peritonea tuberkulozo kaj kuracisto admonis lin plene ripozi. Tamen li ankoraŭ persistis en tuttaga laborado. Plurfoje kiam li estis faranta kalkuladon, la malsano subite atakis lin. Malgraŭ tio li persistis por finplenumi la operacion. Li Ŝanggie esperis ke la lernantoj lernas de li revolucian spiriton de diligenta studo de sciencoj.

Dum interparolado, Ĉen Gingjun foje-refoje montris sian esperon, ke la lernantoj devas lerni de laboristoj, kamparanoj kaj anoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo. Li diris, ke hodiaŭ ili havas tiel bonajn kondiĉojn de lernado, tion ili ŝuldas al onkloj ĈPLA-anoj, kiuj diurne defen-

das la patrolandon, al geonkloj kamparanoj, kiuj nutras ilin per greno, kaj al geonkloj laboristoj, kiuj produktas por ili vestojn. Ili nepre devas bone lerni de ili. Gloraj estas sciencistoj kaj ankaŭ laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.

La paroladoj de la du onkloj multe kuraĝigis la lernantojn kaj ili decidis diligente lerni kaj bone posedi fundamentajn sciojn por servi al la popolo. Fine ili esprimis sian bravan aspiron per jenaj versoj:

*Malfortikas urbo sub atako,
Libr' ne malfacilas, se ni studas
Pro l' kvar modernigoj*, daŭrigule
Ni kuraĝe nian rolon ludas.
En la mond' nenio malfacilas,
Se altecon ni sentime sturmas.*

* Modernigoj de agrikulturo, industrio, nacidefendo kaj scienco kaj tekniko


Dum laboro de iliaj patrinoj

de HONG JING

MI veturis per laborista aŭtobuso al la nordokcidenta antaŭurbo de Pekino por viziti ŝpinteksejon. En la aŭtobuso troviĝis gejunuloj, patrinoj kun beboj en la brakoj kaj patroj kunportantaj infanojn. Oni senĝene babiladis kaj post unuhora veturado la aŭtobuso jam atingis la pordegon de la Pekina Fabriko de Lanaj Litkovriloj ĉe Kinghe-urbeto. Kelkaj virinoj en blanka bluzo rapidis al la aŭtobuso, kaj la infanoj gaje sin ĵetis en ilian sinon. Mi informiĝis de iu juna patrino, ke ili estas vartistinoj. Ĉar la infanĝardeno ne estas en la korto de la fabriko, tial ili ĉiutage venas ĉi tien por preni la infanojn.

EDENO DE INFANOJ

Anstataŭ viziti la laborejojn, mi iris en la infanĝardenon kune kun la vartistinoj kaj naivaj infanoj.




La infanĝardeno havas sume 120 infanojn kun aĝoj de 56 tagoj ĝis ses jaroj. En la vasta korto iuj infanoj ĉaskuras; aliaj faras ludon manon en mano; triaj rajdas sur tricikloj; kvaraj dancas kaj kantas; kvinaj nestas en la sino de vartistinoj kaj lasas ilin plekti por ili harligojn. Vidante min ili konkure krias: "Bonvenon, onklino! bonvenon, onklino!"

La estrino de la infanĝardeno Vang Ŝuhua estas mezaĝa virino entuziasma kaj parolema, ŝi multe rakontis al mi pri la infanĝardeno:

La infanĝardeno, fondita en 1952, ĉefe servas al laboristinoj. Ĝi vartas eĉ 56-tagajn bebojn. Infanoj povas tage vivi en ĝi kaj vespere reveni hejmen kune kun sia patrino aŭ patro post kiam la lasta finas sian laboron. Krome infanoj povas diurne loĝi en ĝi kaj hejme pasigi nur dimanĉon kun la gepatroj. Iuj infanoj eĉ povas viziti ĝin

laŭ dejora tempo de sia patrino aŭ patro. La gepatroj de la infanoj pagas nur 60% de la vartokotizo, kaj la ceteraj 40% estas pagataj de la fabriko. Ĉiumonate oni pagas 12 juanojn por taga vartado aŭ 14 juanojn por diurna vartado inkluzive manĝkoston. Nun la infanĝardeno havas 32 laborantojn, el kiuj la plejparto estas mezaĝaj virinoj. Krome en ĝi servas profesia sanprotektanto.

Korpoekzameno



LERNO DE ABOCO

La infanoj estas dividitaj laŭ la aĝoj en grupojn A, B kaj C.

Kiam mi eniris la amuzĉambron de la grandaĝa grupo A, la infanoj ĝuste okazigis amuzan kunvenon. Starante en la cirklo formita de siaj kunuletoj Ĝang Ĉunjan kantis kantojn "Mi Amas Tian-anmen de Pekino" kaj "Ĉie Floras la Ruĝaj Floroj de Daking". Apenaŭ ŝi finis sian kanton, la infanoj mankrakadis. "Anna, dancu por la onklino." Anna, knabineto kun ronda vizaĝo, forlasis sian sidejon kaj dancis gracie uĝuran dancon. Mi pensis en mi: En estonteco ŝi povos fariĝi eminenta aktorino. Kamaradino Vang diris al mi: "La infanĝardeno ofte faras artan prezentadon por trovi kaj disvolvi la apartajn lertecojn de la infanoj. La aktoretoj plejparte devenas el la grupo A. En festotagoj aŭ ferioj, ili partoprenas en arta prezentado en la Palaco de Geknaboj, kvartaloj kaj fabrikoj. Ilia prezentado ĉiam estas varme akceptataj de la spektatoroj.

Kion alian la infanoj lernas krom kantojn kaj dancojn? Ĝang Ĝenhua, instruistino de la grupo A, diris al mi: Nia grupo lernas lingvon, kalku-

Ludado eksterdome





Kantado

ladon, muzikon, belarton, sporton k.a. Tio estas aranĝita laŭ la aĝo de la infanoj. Krome la infanĝardeno kulturis ilin ĝentilaj, puremaj, laboremaj kaj kolektivismaj.

EN LA MAMNUTREJO

Mi estis enkondukita en grandan, helan kaj puran bebĉambron. Tie orde viciĝas lul-litetoj kovritaj de blankaj litotukoj, sur kiuj metiĝas diverskoloraj vatitaj litkovriloj bone falditaj. Tie loĝas dumonataj beboj kaj unujaraj infanoj kiuj apenaŭ scipovas iri. Mi renkontis tri patrinojn mamnutrantajn. Ili estas laboristinoj de la teksta laborejo kaj ĉiutage venas ĉi tien por mamnutri la bebojn. Ili diris al mi: “Kvankam la beboj ĉiutage bezonas kelkfojan nutradon, tamen la fabriko faris bonan aranĝon por ni en laborado, mamnutrado kaj ripozado. Pro tio ni ne sentas streĉecon de la koro.” Laŭ statistiko, la fabriko havas pli ol 2,900 laboristojn, el kiuj duono estas laboristinoj. Apartajn zorgojn la fabriko havas pri la laboristinoj. Ekzemple, la fabriko periode ekzamenas ilin. Post sepmonata gravediĝo, la laboristinoj povas ricevi malpezan laboron kaj havi laborpaŭzon de unu horo ĉiutage. Laŭ leĝo de la ŝtato, la patrino rajtas ricevi 56 akuŝajn feriojn kun plena salajro. Ŝi povas dufoje mamnutri la bebon en laborhoru dum unu jaro post la nasko. La fabriko aparte disponigis al ili pli ol 20 ĉambrojn por mamnutrado kaj ripozado.

POR KE LA GEPATROJ ESTU TRANKVILAJ

La ĉefa laboro de la infanĝardeno garantii sanan kreskadon de la infanoj estas bone plenumita de la kuiristoj, vartistinoj kaj sanprotektistinoj en kunagado. La kuiristoj ĉiutage faras por la infanoj bongustajn kaj nutrajn manĝaĵojn. La sanprotektistino ĉiutage vizitas la grupojn unu post alia. Kiam ŝi trovas iun infanon malsaneta ŝi tuj donas medicinan helpon al ĝi. Ĉiu infano havas sian sankarton kaj ĉiujare akurate ricevas injektojn kaj medikamentojn por preventi malsanojn. La vartistinoj zorge flegas la infanojn kvazaŭ siajn proprajn en manĝado, dormo kaj vestado. La gepatroj diris, ke ili ĉiuj estas trankvilaj, ke la vartistinoj tiel bone zorgas la infanojn.

“Kompreneble, kelkfoje okazis ke vartistino malpacience traktas infanon.” Kamaradino Vang klarigis al mi, ke iuj junulinoj, kiuj ĵus partoprenis en la laboro, ne havas efikan rimedon por pacigi petolemajn infanojn kaj perdis fine paciencon. Sub helpado de kamaradoj, ili altigis sian laboran kapablon kaj starigis amikecon kun la infanoj, kaj tiam aliĝis la stato.

LA “EKSTERORDINARA GRUPO”

Posttagmeze, akompanate de kamaradino Vang, mi vizitis la “eksterordinaran grupon”. En vasta hela ĉambro estas pli ol 20 geknaboj skribantaj ĉe tabloj. La plejparto de ili estas

pioniroj kun ruĝa koltuko. “Kial en la infanĝardeno estas lerneĵano!?” mi demandis. Kamaradino Vang ekridis. La afero staras tiel: Por doni oportunon al la laborantaj geedzoj, la fabriko fondis tiun grupon por prizorgi iliajn geknabojn post la lernaj horoj. Nun la infanĝardeno preparas por ili manĝon kaj disponigas al ili litojn por dormi. Post la lecionaj horoj la geknaboj faras hejmtaskojn aŭ diversajn aktivadojn en la infanĝardeno sub helpo de instruisto. La gepatroj de la lernantoj ĉiumonate pagas al la infanĝardeno nur 5-6 juanojn por manĝo kaj alia uzo.

“La infanĝardeno prizorgas la geknabojn por malmulta pago, tamen ĝi donas al ni patrinoj

multajn helpojn.” Ĝeng Li, patrino de Liu Giang kaj Liu Fang, laŭdis antaŭ mi siajn infanojn: “Miaj du infanoj ellernis multajn sciojn en la infanĝardeno, nun ili ŝatas kanti, danci kaj estas ĝentilaj kaj ŝatataj de ĉiuj.”

En la pasinteco, la laboristinoj ofte estis tre lacaj pro flegado de infanoj kaj dommastrumado. Nun, same energiaj kiel laboristoj ili diligente laboras sur sia posteno. De multaj jaroj, multaj el ili neniam forlasis sian postenon, pluraj eminentaj laboristinoj estis promociitaj kiel gvidantoj de grupo, laborejo kaj fabriko, iuj fariĝis famaj lertuloj en produktado, kaj aliaj estis elektitaj kiel laboraj modeloj.



Vizito al islanda esperantisto

Islanda esperantisto S-ro Ragnar, kiu studas en la Pekina Universitato, partoprenis en la 62-a Universala Kongreso de Esperanto okazigita en Rejkjaviko, kiam li reiris al sia hejmo en Islando en somero de 1977. Post lia reveno al Pekino nia raportisto lin vizitis. Dum ilia intima interparolado S-ro Ragnar ankaŭ respondis kelkajn demandojn faritajn de nia raportisto. Ĉi-sube estas parto de ilia dialogo.

— La Red.

Raportisto: S-ro Ragnar, ĉu vi povas iom paroli pri la travivaĵoj en via hejmlando kaj en la Universala Kongreso?

Ragnar: Tre bone, ĉi-foje mi revidis ne nur miajn familianojn, sed ankaŭ multajn geamikojn. Ili ĉiuj multe demandis pri mia vivo en Ĉinio kaj ili estis scivolemaj pri ĉio, kion mi vidis ĉi-tie. Mi faris multajn respondojn kaj klarigojn, kaj tiel mi iom provis kontentigi ilian scivolemon.

Mi ankaŭ partoprenis en la 62-a Universala Kongreso de Esperanto. Tio estis la unua fojo,

ke tiu kongreso estis okazigita en Islando. La Kongreso ĝuis la favoron de la registaro kaj la publiko de Islando. La prezidento de Islando, la ministro de la Islanda Kultura Ministrejo kaj la urbestro de Rejkjaviko ĉeestis la inaŭguron kaj la du lastaj alparolis al la Kongreso en Esperanto. La ĵurnaloj, radio-disaŭdigoj kaj televido de Islando donis amason da informoj pri la Kongreso, kaj en la televido prezentigis duonhore kongresa diskuto en Esperanto.

Ni ankaŭ ĝojis pro la fakto, ke la unua sekretario de la ambasadorejo de Ĉinio ĉeestis la

inaŭguron. Estis la dua fojo por mi partopreni en la Universala Kongreso de Esperanto. Ĝi faris al mi belan impreson, kaj ĝia atmosfero estis plena de amikeco kaj internacieco. Bona preparado kaj organizado ankaŭ multe kontribuis al la sukceso de la Kongreso.

Raportisto: Ĉu vi renkontis en la kongresejo legantojn de "El Popola Ĉinio"? Kiujn opiniojn ili havis pri tiu ĉi gazeto?

Ragnar: Mi ja renkontis kelkajn el la legantoj de "El Popola Ĉinio". Ili ĝenerale interesiĝis pri tiu ĉi gazeto kaj opiniis ke la enhavo estas bona kaj la aspekto bela. Iuj el ili proponis, ke la gazeto aperigu novelojn aŭ folkloron aŭ aliajn literaturajn verkojn kaj aperigu ankaŭ novaĵojn pri Esperanto. Ili diris, ke la gazeto povas ankaŭ enhavi instruajn fabelojn kaj proverbojn, ĉar Ĉinio havas longan kulturen historion kaj tial estas riĉa je tiaj kulturaj heredaĵoj. Mi persone proponas, ke la enhavo de la gazeto estu pli varia kaj la stilo pli vigla.

Raportisto: Mi certe transdonos tiujn opiniojn al la kamaradoj de nia redakcio. Mi tre dankas vin, ĉar vi faris multon por plifortigi la amikecon inter la popoloj kaj esperantistoj de Ĉinio kaj Islando.

Ragnar: Mi tre ĝojas, se mi faris ion por la amikeco inter la popoloj de niaj du landoj. Post mia hejmvreveno mi faris raportojn en la Islanda-



S-ro Ragnar Baldursson

Ĉina Kultura Asocio kaj prezentis lum-bildojn faritajn de mi dum mia vizito al diversaj lokoj en Ĉinio, kaj la ĉeestantoj esprimis grandan entuziasmon pri Ĉinio. Oni povas facile antaŭvidi, ke kun la plifortigo de la interrilato inter niaj du landoj, certe plue disvolviĝos la amikeco inter niaj popoloj.

Raportisto: Multan dankon!

Senditoj-artistoj de Rumanio

de BIAN GIGI



EN septembro kiam la osmanto aromis, la arta rumana armea ensemblo Doina venis al Ĉinio.

Doina, la amika senditaro de la rumana popolo estas bone konata de la ĉina popolo kaj ankaŭ malnovaj amikoj de la artaj laborantoj de la ĉina armeo. Ĝi plurfoje vizi-

tis Ĉinion kaj ĉiufoje profunde ravis la ĉinajn spektatorojn.

Ĉifoje la ensemblo konsistis el pli ol 170 membroj sub la gvido de subadmiralo Pricop Iosif, vicdirektoro de la Propaganda kaj Kultura Departemento de la Plej Alta Politika Konsilantaro de la Rumanaj

Armitaj Fortoj. Inter ili multaj, kiuj duafoje venis al Ĉinio, ĝoje parolis pri siaj pasintaj vizitoj tuj post atingo al Pekino. Dancmajstroj Bedea kaj Baciŭ vizitis nian landon jam la kvaran fojon. Ili diris: En 1952, kiam ili unuafoje vizitis Ĉinion, Prezidanto Maŭ rigardis ilian prezentadon en Pekino kaj akceptis ilin. Aŭdinte ke ili vizitos sudan Ĉinion, li zorgeme diris al ili ke tie estas tre varme. Poste, oni faris por ĉiu artisto kompletan da blankaj vestoj. En 1966, kiam ili duafoje vizitis Ĉinion, ili ĝoje pasigis la novjaran tagon kune kun Ĉefministro Ĝoŭ. Ili esprimis, ke ili nepre faros novajn klopodojn en tiu ĉi vizito por plifortigi la batalan solidarecon inter la popoloj kaj armeoj de Rumanio kaj Ĉinio, por ke la amikaj floroj floru pli bele.

La 1-a de oktobro de 1977 estis la 28-a datreveno de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko. Antaŭtagmeze, kiam la artistoj de la ensemblo venis al la parko Ĝongŝan, infanoj en festaj kostumoj ekdancis por bonvenigi ilin. La



Ĥoro

rumanaj amikoj ĝoje manpremis kun infanoj, kaj iuj kaŭris inter infanoj por preni foton.

Post prezentado de la dancoj kaj kantoj plenumita de ĉinaj artistoj, la rumanaj artistoj suriris la scenejon kaj kantis rumanajn kaj ĉinajn kantojn. Ili rikoltis varman aplaŭdon de la spektatoroj.

La arta ensemblo Doina faris prezentadon en Pekino, Hi-an, Ĉengdu, Kunming, Ĉangŝa kaj aliaj urboj kaj ĉie ili estis entuziasme bonvenigitaj.

Doina estas meritoplena arta ensemblo, kiu heredis revolucionan tradicion kaj historian nacian arton de Rumanio. Ĝi estas altnivela en
(Daŭrigota sur la p. 48)



Pentrita de Dong Ĉenŝeng

Popola danco



La menbaoj

de ZONG MIN

LA menbaoj estas unu el la ĉinaj naciecoj. Ĉ. 40,000 el ĝiaj membroj loĝas en Monjam de la sudorienta parto de la Tibeta Aŭtonoma Regiono, kaj la ceteraj 5,600 dise loĝas en la tibetaj gubernioj Medo, Ningĉi kaj Cona.

La menbaoj restas longe en amika kontakto kun la tibetanoj: Ili geedziĝas unuj kun aliaj kaj forte influas reciproke en politiko, ekonomio, kulturo, religio, kutimoj kaj moroj.

La menbaoj havas sian propran lingvon, apartenantan al la tibeta lingva subordo de la tibeta-birma lingvofamilio de la hana-tibeta lingvosistemo. Plejparto de la menbaoj scipovas kaj uzas la tibetan lingvon, kaj ili portas la samajn nomojn, kiujn portas la tibetanoj.

La menbaoj havas siajn proprajn morojn. La menbaoj en Monjam, ĉu viro aŭ virino, ĉiuj portas ruĝan lanan robon, malgrandan brunan ĉapon kun oranĝa rando kaj entranĉaĵo en la fronto aŭ nigran feltan ĉapon. La virinoj portas blankan antaŭtukon, braceletojn, kolierojn kaj orelingojn. La vestaĵoj de la menbaoj de la gubernioj Medo, Ningĉi kaj Cona estas samaj al tiuj de la tibetanoj. Iliaj ĉefaj manĝaĵoj estas poligono, maizo, rizo, hordeo, hordea vino, butera supo kaj laktaĵoj. Iliaj 2-3-etaĝaj domoj havas

ŝtonajn murojn kaj lignan aŭ bambuan duklinan tegmenton. Homoj loĝas en la supra etaĝo kaj brutoj en la teretaĝo. En nokto ili sternas sur planko krudan tapiŝon aŭ felon, kaj dormas sur ĝi en vestoj. Ili observas monogamion. La menbaoj praktikas akvan sepultadon kaj ankaŭ entombigon kaj kremacion. Ili havas komunajn festojn kun la tibetanoj kaj uzas la tibetan kalendaron.

La regiono Monjam koncentre loĝata de Menba-nacieco deantikve estas neapartigebla teritorio de nia lando. En Tang-dinastio de la 8-a jarcento la regiono estis teritorio de Tufan-regno. En la 13-a jarcento la regno estis regata de Juandinastio. En la mezo de la 17-a jarcento, la loka registaro de Tibeto konstruis en Monjam la faman templon Montavang kaj establis tie regantan organon kaj de tiam komenciĝis la regado politika kaj religia en unueco. Poste la tibeta loka registaro dividis Monjam en 32 distriktojn, praktikis lamaigon (nome, se oni havas tri filojn, do la dua devas fariĝi lamao), impostis la loĝantaron, servigis ilin, registris ilian loĝantecon, nomumis oficistojn, defendis landlimojn kaj faris efikan administradon.

Post la mezo de la 19-a jarcento, King-dinastio intensigis sian regadon

al Monjam, sendis tien oficistojn por direkti ĉiutagajn aferojn politikajn kaj religiajn. Cetere la dinastio establis tie pli superan asembleon por fari leĝojn kaj regulojn kaj solvi gravajn problemojn de politiko, religio kaj landlimaj konfliktoj.

La menbaoj okupas sin ĉefe per agrikulturo, kaj cetere ankaŭ paŝ-

Menbaa virino plektas korbon.





Menbaa infano

tado kaj ĉasado. Antaŭ la Liberigo, pro la sufoka kateno de la reakcia kaj feŭda servuta sistemo en Tibeto, la tiea agrikulturo restis en primitiva stadio. Kaj flankokupe la menbaoj faras rotangajn kaj bambuajn korbojn, tinkturon kaj arbohakadon.

En 1951, Tibeto estis pace liberigita. En 1959, helpate de la Ĉina Popola Liberiga Armeo, la miliono da tibetaj servutuloj subpremis la kontraŭrevolucion arman ribelon faritan de la supera reakcia reganta kliko de Tibeto estrata de Dalajlamao, faris demokratian reformon kaj renversis la reakcian regadon de la loka registaro, aristokratoj kaj temploj. Kaj ankaŭ menbaoj en la gubernioj Medo, Ningĉi kaj Cona emancipiĝis kaj fariĝis mastroj de la ŝtato.

Post la demokratia reformo, dank' al la granda helpo de tibetanoj kaj hanoj, la menbaoj ekmarŝis per grandaj paŝoj sur la socialisma vojo. En montregiono Lepo de Cona-gubernio estas 10 vilaĝoj kun 108 familioj. Antaŭe tie la loĝantoj havis grenon sufiĉan nur por 4

monatoj en ĉiu jaro kaj dum la cetera tempo ili devis sin vivteni per sovaĝaj vegetaloj kaj ĉasaĵoj. En 1960, en tiu regiono fondiĝis interhelpaj grupoj de agrikulturo. De tiam ili ekuzis novtipan plugilon anstataŭ la bastono, kiun ili uzis antaŭe por fosi teron, kaj komencis plugi profunde, sarki herbaĉojn, sterki kampojn kaj ekstermi fiinsektojn. Samtempe kun tio, sub la helpo de tibetanoj kaj hanoj, ili ekspluatis virgan teron, plivastigis la areon de la kampoj, sur kiuj oni plantas plurajn fojojn kaj aplikis bonrasajn semojn. Ĝis 1971, la areo de la kampoj de Lepo kreskis ĝis duoblo de tiu en 1959, la hektara produktokvanto de greno duobliĝis kaj bonan rikolton oni akiris en sinsekvaj jaroj. Nun la montregiono jam havas superbezonan grenon por liveri al la ŝtato. Cetere ankaŭ forstumo kaj brutobredado multe progresis. Ili unufoje ekbredis porkojn kaj kulturis tearbojn kaj tabakon.

En la regiono loĝata de la menbaoj estas altaj montoj kaj profundaj ravinoj kun tre malfacila trafiko. En Medo-gubernio antaŭe cirkulis jena popolokanto:

*Ascende ĝis la supr' de nubskrapanto,
descende ĝis rivera akvorando,
eĉ tutan tagon oni devas iri
por veni al aŭdebla parolanto.*

La montvojetoj estis tre mallarĝaj kaj super riveroj servis kiel transpasiloj nur glitkabloj kaj pontetoj el sola trunko. Kiam okazis montatorento aŭ terfalo, iuj vilaĝoj estis tute izolitaj dum longa tempo. Post la demokratia reformo, oni konstruis tie vojojn kaj ŝtalajn pendpontojn, kiuj multe faciligis la trafikon.

Post la demokratia reformo ankaŭ higiena afero kaj edukado multe progresis. Antaŭe tie ne troviĝis higiena organizo kaj la menbaoj ne

povis ricevi kuracon. Tiam ofte okazis epidemioj kaj multaj mortis de malsano. Nun sub la zorgo de la kompartio kaj la popola registaro kaj helpo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo, en la loko fondiĝis higienaj organizoj, kiuj donas senpagan kuracon. Menbaaj nudpiedaj kuracistoj estas elkulturitaj. Tie jam fondiĝis elementaj lernejoj kaj vesperaj kursoj, dank' al kio multaj menbaaj gejunuloj akiris legoscion, kaj iuj el ili poste fariĝis la unuaj instruistoj, kontistoj, sanitaristoj, filmoprojekciistoj kaj diversaj teknikistoj. Parto de la junuloj estis senditaj en la Tibetan Nacimulplimultan Instituton kaj la Centran Nacimulplimultan Instituton en Pekino.

Estas du popolkantoj, kiuj povas lojale speguli la pasintecon kaj nunan staton de la menbaoj. La unua estas indigna akuzo de la menbaoj kontraŭ la servuta ekspluatado:

*La birdoj rajtas flugi laŭ la volo,
sed la menbaoj havas ne personliberon;
la pavo havas ja plumaron belan,
sed la menbaoj havas eĉ ne ŝuojn kaj ĉapelon.
La ŝarĝobruoj havas nutron eĉ dum nokta ripozado,
por kiuj penlaboras la menbaoj tage en malsato?*

Nun la menbaoj kantas kun ĝojo:

*La menbaoj estas ĵus disvolviĝinta floro
en la granda socialism-gardeno de 1' patrio.
Ĝi prosperas dank' al fleg' de Prezidanto Maŭ
kaj irigacio de 1' Partio.*

(Fotoj de Suo Venking)



La Ĉina-Franca Milito

de SI GIN

EN la 80-aj jaroj de la 19-a jarcento eksplodis milito inter Francio kaj Ĉinio. Tra akva vojo la francaj trupoj agredis apudmarajn provincojn kaj urbojn de Ĉinio, samtempe aliaj trupoj okupis Vjetnamion kaj tra Vjetnamio invadis la ĉinajn sudokcidentajn provincojn. Fronte al la agreso, tre indigniĝis la ĉina popolo. La amasoj kaj patriotaj oficiroj kaj soldatoj firme batalis kontraŭ la franca agreso kaj akiris multajn venkojn. Sed la reakcia kaj putra registaro de King-dinastio aplikis kapitulacisman linion, tiel ke la venkinta Ĉinio malvenkis, dum la venkita Francio venkis.

En la mezo de la 19-a jarcento Francio jam okupis la sudan parton de Vjetnamio kaj sin preparis por engluti la nordon. Sed, pro sia malvenko en la Prusa-Franca Milito, Francio devigite ĉesigis portempe la pluan agreson al Ĉinio kaj Vjetnamio. En la 80-aj jaroj de la 19-a jarcento, Francio jam refreŝigis sian forton kaj ĝia financa kapitalo ekspansiis tre rapide, kio pretigis kondiĉojn al Francio por denove militakiri koloniojn.

Kiam la francaj trupoj invadis la nordan parton de Vjetnamio kaj minacis la sudokcidentajn landlimajn regionojn de Ĉinio, la ĉina popolo forte postulis, ke la registaro de King-dinastio rezistu kontraŭ Francio. Sed la efektiva reganto de King-dinastio Imperiestra Patrino Cihj kaj grava ministro Li Hong-

ĝang aplikis kapitulacisman linion. La francaj trupoj unue atakis trupojn de King-dinastio kaj per tio komenciĝis la milito. La King-dinastia registaro devigite rezistis kontraŭ la agreso de Francio, sed samtempe ĝi senĉese klopodis por kompromisi kun Francio, tiel ke la justa kaj kontraŭagresa Ĉinio en la milito suferis plurajn malvenkojn tuj post eksplodo de la milito.

En julio de 1884, la floto de la Franca Ekspedicio komandata de la ĉefo Courbet entrudiĝis en la buŝon de Mingiang-rivero de Fugian-provinco kaj ankris en la milita haveno Mavej fronte al la ŝipoj de la Ĉina Fugian-a Floto. La ĉefo de provincoj Fugian kaj Ĝegiang He Ging, ŝipkonstrua ministro He Juĝang kaj aliaj grandaj burokratoj estis fanfaronaj kapitulaculoj. Antaŭ la

agreso de francaj militŝipoj, ili faris nenian preparon kaj eĉ malpermesis al la Fugian-a Floto unue kanoni al la agresantoj, instrukciante, ke kiu malobservos, tiu estos kondamnita al morto, malpermesis disdoni municion antaŭ komenciĝo de batalo kaj malpermesis al la militŝipoj malankri sen ordono. Tio metis la Fugian-an Floton en situacion tre maloportunan.

En aŭgusto de la sama jaro la francaj agresantoj atakis Tajvan de nia lando, detruis la kanonaron de Gilong kaj surteriĝis tie. La garnizono de Tajvan faris firman reziston, mortigis kaj vundis pli ol 100 francajn soldatojn kaj sukcese repuŝis la francajn trupojn. Poste, la franca floto turniĝis al Fuĝoŭ. En la posttagmezo de la 23-a de aŭgusto la francaj militŝipoj en la haveno

La Armeo de Nigra Flago rezistas al la franca agresa armeo.



Mavej subite ekkanonis. La ĉinaj militŝipoj haste malankris kaj rezistis, kaj iuj el ili estis dronigitaj antaŭ ol ili havis la tempon por levi la ankrojn. En malfavora situacio, la subaj oficiroj kaj soldatoj de la Fugian-a Floto faris bravan reziston. La militŝipo «Ĝenvej» estis vundita je pluraj lokoj, sed antaŭ ol ĝi dronis, ĝi hisis la ĉinan flagon kaj faris al franca militŝipo lastan pafon, kiu grave vundis ĝian ŝipestron. La militŝipo «Fuhing» sola sturmis inter francajn ŝipojn kaj forte atakis ilian flagŝipon. Sed la municia kajuto de la ŝipo malfeliĉe estis trafita de obuso kaj eksplodis, kaj la tuta ŝipanaro martiriĝis. La 11 ŝipoj de la Fugian-a Floto estis dronigitaj unu post alia, kaj ankaŭ la Ŝipkonstrua Fabriko Mavej estis detruita en kanonado de la malamikoj.

La ekspansiigo de la agreso de Francio vekis senkomparan indignon de la ĉina popolo. En apudmaraj lokoj senĉese okazis eventoj de detruo de preĝejoj kaj forpelo de fremdlandaj misiistoj. Trans-

Uniformo de franca soldato predita en la Ĉina-Franca Milito



maraj elmigrintoj entuziasme donacis monon por helpi la popolanojn de la patrolando en ilia batalo kontraŭ la agreso. La ĉinaj laboristoj de Hongkong strikis por oponi kontraŭ la francaj agresantoj. Ŝipkonstruaj laboristoj rifuzis ripari francajn militŝipojn kaj dokistoj rifuzis ŝarĝi kaj malŝarĝi ŝipojn per francaj varoj.

En oktobro la francaj trupoj refoje okupis Gilong kaj atakis Tajbej. La armeo kaj popolo de Tajvan obstine rezistis, venkis la francajn agresantojn en Danŝuj kaj tiel frakasis la planon de la francaj trupoj okupi Tajbej. Poste, la francaj trupoj direktis sin norden kaj atakis Ĝenhaj-regionon de Ĝegiang-provinco kaj estis repuŝitaj de la ĉina garnizono.

En la komenco de 1885, por kiel eble plej frue fini la agresan militon, Francio sekrete traktadis kun la registaro de King-dinastio por devigi ĝin kapitulaci, kaj samtempe senĉese atakis la ĉinajn trupojn. Sur la maro la francaj flotoj atakis apudmarajn lokojn de Guangdong-provinco kaj okupis la insularon Penghu. Kaj surtere la francaj trupoj en orienta kaj okcidenta kolonoj sin direktis al la provincoj Guanghi kaj Junnan. En februaro la orienta kolono okupis Langson de Vjetnamio kaj proksimiĝis al Guanghi de Ĉinio. La situacio estis tre danĝera. Li Hongĝang ordonis Pan Dinghin, ĉefon de Guanghi evakui. Do Pan Dinghin retiriĝis ĝis Longĝoŭ, kiu distancis norde de Ĝennan-pasejo (nun Joŭji-pasejo) 70 kilometrojn. En la 23-a de februaro la francaj trupoj enpuŝiĝis en la pasejon kaj retiriĝis post bruligado kaj prirabado al ĝi. Poste la francaj trupoj sin preparis por agresi Longĝoŭ kaj arogante kriis: "Ne plu ekzistas la pordo de Guanghi!"

Tamen la agresantoj mistaksis la situacion. La popolanoj de Ĝennan-

pasejo skribis sur muro apud la pasejo: "Ni rekonstruos nian pordon per kapoj de francaj kanajloj!" La patriotaj oficiroj kaj soldatoj faris aktivan preparon por frakasi atakojn de la malamikoj. Maljuna komandanto Feng Zicaj kaj liaj trupoj rapide venis al Ĝennan-pasejo, konstruis fortikaĵojn kaj dividis siajn trupojn en plurajn kolonojn por rezisti kontraŭ la agreso. En la mezo de marto pluraj atakoj de Francio estis repuŝitaj.

En la mateno de la 24-a de marto regis densa nebulo. Sub ŝirmado de kanonado la francaj trupoj proksimiĝis al la longa muro konstruita de la ĉinaj trupoj kiel defenda fortikaĵo kaj iuj trupoj jam transpasis la muron. En tiu kriza momento, 70-jara Feng Zicaj, kiu portis kaptukon kaj sandalojn, kriegante sturmis la malamikojn tenante lancon. Lin sekvis multaj patriotaj oficiroj kaj soldatoj kaj faris mortan lukton kontraŭ la malamikoj. Malvenkis la francaj trupoj. La ĉinaj trupoj reprenis vastan teron.

Samtempe kun tio ankaŭ la okcidenta kolono de la francaj trupoj estis severe punita. La kamparana armata forto Armeo de Nigra Flago gvidata de Liu Jongfu faris ofensivon kaj plurfoje venkis la agresantojn.

La brila venko de la ĉina popolo grave draŝis la arogantecon de la francaj agresantoj. La militema kabineto de Jules Ferry falis pro la malvenko de Francio en la milito. Sed la putra King-dinastia registaro volontis tuj fini la militon en venko. En aprilo reprezentantoj de Ĉinio kaj Francio kontraktis en Parizo «Armistican Konvencion». En junio la naciperfidulo Li Hongĝang kaj reprezentanto de Francio kontraktis en Tiangin la malegalrajtan «Ĉinan-Francan Traktaton».


Luohan-frukto

LA subaj bildoj montras luohan-frukton, kiu estas uzata kiel kuracilo en ĉina tradicia medicino. Ĝi havas kuracefikon kontraŭ tusaĉo, por nutri hepaton kaj fortigi viklecon. En la lastaj jaroj, pere de scienca esplorado kaj klinika provado oni konstatis ke ĝi estas efika ankaŭ kontraŭ hipertensio. Per daŭra prenado ĝi povas preventi malsanojn kaŭzitaĵn pro infekto de spirkanalo.

Ĝi estas plurjara ramplanto apartenanta al kukurbacoj kaj estas dioika. Luohan-fruktoj estas rondaj kun grandeco de pugno aŭ anasovo kaj havas bluan koloron. Ĝi fariĝas bruna post bakado per milda fajro ĝis sekeco. Ties pistajo post infuzo odoras agrable. Ĝia infuzajo estas bona trinkaĵo pro riĉeco de glukozo kaj dolĉeco.

La gubernio Jongfu de la Guanghi-a Ĝuang-nacieca Aŭto-

noma Regiono de Ĉinio estas ĝia ĉefa produktejo, kiu jam havas kulturhistorion de 200 jaroj. Laŭ tiea legendo, iu kampulo trovis tiajn aromajn fruktojn sur monto dum kolektado de brulligno. Li kolektis kaj portis iom el ili al sia hejmo. En la vilaĝo neniu konis tiun frukton, eĉ plej maljunaj vilaĝanoj sciis nenion pri ĝi. Neniu scias, ĉu ĝi estas manĝebla, kaj neniu kuraĝis gustumi ĝin. Poste la fruktoj venis



Arta fekundigo

*Kolektado de Luohan-fruktoj
(Momordica grosvenori Swingle)*

King-dinastio konsentis malfermi landlimajn urbojn de Junnan kaj Guanghi kiel komercajn urbojn. Pro tio la pordo de la sudokcidenta Ĉinio estis malfermita pli larĝe. Jen tiel humile la registaro de King-

dinastio finis la Ĉinan-Francan Militon.

La historiaj faktoj pruvis: Paco ne povas esti efektiva per humila cedemo. La King-dinastia re-

gistaro intencis akiri kvieton per humila cedado al agresantoj, sed la imperiismaj potencoj rekompencis ĝin per pli furioza agreso. Poste eksplodis pli granda milito inter Ĉinio kaj Japanio.



Ĉe la sojlo de la jaro 1978

Karaj legantoj,

Je la alveno de la jaro 1978 ĉiuj laborantoj de la redakcio sendas al vi plej sincerajn bondezirojn.

Same kiel antaŭe, en la ĵus pasinta jaro nia laboro ricevis subtenon kaj helpon de niaj legantoj. Multaj legantoj varme laŭdis nian revuon eĉ pro ĝia malgranda progreso, kaj ankaŭ sincere elmetis kritikojn kaj proponojn por helpi nin plibonigi ĝin, kvankam nia laboro progresas malrapide. Pro tio ni esprimu al niaj karaj legantoj korajn dankojn.

En la nova jaro ni varme petas, ke niaj legantoj plue donu al ni valorajn subtenon kaj helpon. Tio estas unu el la gravaj kondiĉoj por progreso de nia revuo.

Kion do faros la redakcio por plibonigi la revuon en la nova jaro?

Ĝi daŭre prezentos progresojn de la ĉina popolo en la revolucio kaj

.....

al la mano de iu popola kuracisto Luo Han. Ankaŭ li ne konis la frukton, tamen li estis homo esplorama. Post longa esplorado kaj provado li trovis ke la frukto estas bona kuracilo kontraŭ tusado kaj pulmaj malsanoj. De tiam la frukto ricevis sian nomon. Kaj oni ekkulturis la planton.

Oni nun preparas el ĝi trinkaĵojn kaj medikamentojn, kiuj estas eĉ eksportataj eksterlanden kiel ĉinaj specialaj produktaĵoj.

konstruado sub la direktado de la gvidanto Prezidanto Hua Guofeng kaj krome pliriĉigos la enhavon pri socia vivo, popolaj kutimoj kaj moroj, kulturo, scienco k. a. kaj klopodos por vigligi la revuon en formo.

Ĉijare, ni konservis la malnovajn rubrikojn "Por Amikeco", "Ĉinaj Naciecoj", "El Ĉina Moderna Historio", "Historiaj Objektoj" kaj "Kurantaj Aferoj", revivigis la rubrikon "Inter Ni" kaj aldonis novajn rubrikojn "En Pekino", "Esperantaj Novaĵoj", "Pri Provincaj Ĉefurboj de Ĉinio", "Arkeologia Angulo" kaj "Kalejdoskopo".

La rubriko "En Pekino" prezentos al vi vidindaĵojn, antikvajn restaĵojn, konstruaĵojn, parkojn k. a. de Pekino. "Inter Ni" publikigos respondojn al demandoj de legantoj por pliintimigi la rilaton inter la legantoj kaj ni. Komence de la unua numero ĉijare ni aperigos koncizan mapon de Ĉinio por montri sur ĝi la geografian pozicion de iuj lokoj menciitaj en la artikoloj.

Ni rekomendas al niaj legantoj la artikolon "Prezidanto Maŭ pri Esperanto" en tiu ĉi numero. En 1939 Prezidanto Maŭ faris surskribon al la ĉinaj esperantistoj, kio montris direkton por ilia laboro. Pri tio multaj fremdlandaj amikoj tre interesiĝis kaj esperas, ke ni pli detale prezentos la surskribon. Ĝuste por kontentigi tiujn amikojn ni skribis tiun artikolon.


La 8-a de januaro de la kuranta jaro estas la dua datreveno de la forpaso de Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj. La ĉina popolo ĉiam karmemoras lin kaj ankaŭ fremdlandaj amikoj rememoras lin per diversaj formoj. Ni neniam forgesos liajn eminentajn kontribuojn al la revolucio. La artikolo "Ĝoŭ Enlaj vivos eterne kun siaj meritoj" en tiu ĉi numero registris parton de liaj revoluciaj aktivadoj antaŭ la naskiĝo de la nova Ĉinio, kiu vidigis al ni lian fidelecon al la proletara revolucia afero kaj lian talenton en batalo. Post la frakaso de la "kvarpersona bando" kaj forigo de ĝia malhelpo, ĉie en Ĉinio prezentiĝas nova fizionomio. La artikoloj "Nova paŝo de ĉina industrio", "Nova fizionomio de la Pekina Kemia Fabriko", "Grundologo Hoŭ Guanggiong" k. a. spegulas de diversaj flankoj tiun bonan situacion. "Dum laboro de iliaj patrinoj" priskribas nur aferon de iu fabriko. Efektive en la nuna Ĉinio bonstatigaj aferoj de la popolamasoj estas pli kaj pli multe zorgataj kaj plibonigataj.

Karaj legantoj, proverbo diras: Komenco bona — laboro duona. La komenco de ago estas tre grava. Kun plena memfido la laborantoj de nia redakcio diligente klopodos en la nova jaro por ke nia revuo ludu pli bone la rolon de ponto de amikeco.

Feliĉan Novjaron!

La Red.

Konciza Mapo de Ĉinio



- | | |
|-------------|-------|
| 1. Giangsu | Vuhi |
| 2. Senhi | Hi-an |
| 3. Hingiang | Tomur |



La lokoj montritaj en la mapo estas menciitaj en jenaj artikoloj de tiu ĉi numero: "Ĝoŭ Enlaj vivos eterne kun siaj meritoj", "Antikva urbo en verdajoj" kaj "Ruĝa flago starigita sur la montpinto Tomur".



NOVA AKVOPURIGA EKIPAĴO

La unua grandtipa ekipaĵo por akvopurigo per sorbado per aktiva karbo, uzata en petrolrafinado, projektita de Ĉinio mem, estas sukcese fabrikita kaj bone funkcias en Ĉangling-petrolrafinejo de Hunan-provinco.

Ĝia rolo estas pluapase forigi petrolon kaj aliajn malutilaĵojn en malpura akvo de petrolrafinado per filtrado per sablo kaj sorbado per

aktiva karbo post purigo per barado, flosigo kaj vegetajkemia metodo, tiel ke la traktita akvo atingas la puran normon de surtera akvo. Ĉiuhore ĝi povas trakti 600 tunojn da malpura akvo. La purigita akvo estas ne plu drenita en riveron, sed utiligata cirkule en la maŝinoj. Tio ne nur havigis al rafinado de petrolo la duan akvofonton sed ankaŭ pluapase limigis la malpurigon de la petrolrafinejo al la medio.

PLEJ GRANDA ŜARGMAŜINO FARITA DE NIA LANDO

5-kubmetra ŝargmaŝino, la plej granda de Ĉinio, estas produktita de la Liuĝou-a Fabriko de Konstruaj Maŝinoj.

Tia 400-ĉevalpova ŝargmaŝino kun 5-kubmetra ŝovelilo estas grava kaj urĝe bezonata maŝino en konstruado de minejoj, akvoutiligaj konstruaĵoj, vojoj kaj havenoj. Ĝi povas movi ĉiufoje 9 tunojn da erco kaj ankaŭ povas fari fosadon,

puŝi teraĵon, levi pezajon kaj tiri aliajn maŝinojn. La maŝino estas eleganta, facilmovi, stabila kaj facile manipulebla kaj atingis avangardan nivelon en teknologio.

PLIPRODUKTO DE DROGHERBOJ

Tajbaj-gubernio de Ŝenhi-provinco aktive kulturis drogherbojn kaj la kvanto de la aĉetitaj drogherboj en la unuaj ok monatoj de la pasinta jaro atingis 2.4-oblon de tiu de la sama periodo de 1976.

Tajbaj-gubernio kun altaj montoj kaj vastaj arbaroj abundas je diversaj vegetaĵoj. Ĝi estas kromnomata Loko de Drogherboj. Krom aktiva kolektado de sovaĝaj drogherboj, tiu gubernio ankaŭ energie disvolvas kulturadon de drogplantoj. Nun ĉiu produkta brigado de la gubernio jam havas kultivejon de drogherboj kaj la areo de ĝiaj 98 kultivejoj atingis 460 hektarojn. Valoraj drogherboj transplantitaj el aliaj provincoj kiel ginsengo, gastroduo kaj fritilario bone kreskas tie.

(Daŭrigo de la p. 40)

voĉa kaj instrumenta muzikoj kaj en dancarto. Ĝia ĥoro estas fama pro harmonia unueco, impresive forta voĉo, kaj la tre bela tembro kaj profunda malleĝero. Multaj malnovaj aktoroj havas solidan ekzercecon kun virtuoza ludarto. «Mi Amas Nian Nacian Emblemon», «La Volo de Nia Nacio» kaj «Armea Kantato» prezentitaj de la ĥoro plene esprimis la senlimajn fidelecon kaj amon de la rumana popolo kaj armeo al la socialisma patrolando kaj ilian decidemon en defendo de la fruktoj de la revolucio, nacia sendependeco kaj ŝtata suvereneco. Ĝi povas prezenti kantojn kun tre malsamaj stiloj. La armea kanto «Soldatoj Marŝas Antaŭen Kantante», kiu havas originale klaran ritmon en melodio kun folkloro gusto, provizas sin per aparta ĉarmeco kaj esprimas la bravecon kaj optimismon de soldatoj. La du plenumitaj lirikaj kantoj estas ĥoraĵoj kun forta nacia gusto. La kantistoj sufiĉe sukcesis en kunordigo de voĉpartoj kaj aranĝo de fortetoj. La direktado majstre farita de Kolonelo Sergiu Eremia estis riĉa je pasio.

La kantado de ambaŭ merita artisto Ion Bogza kaj solisto Alex-

andru Ionita havas altajn teknikojn kaj efektopovon. Ili rikoltis laŭdojn de spektatoroj pro prezentado de antikvaj rumanaĵoj, elektitaj pecoj el malpezaj operoj kaj ĉinaj kantoj «Reveno de Celpafado» kaj «Gardostaro por Nia Granda Patrolando». La kantado de multaj kantistoj estas riĉa je folkloro gusto kun bela tembro kaj efekto de intimeco.

La folkloro muziko de Rumanio estas fame konata tra la mondo. La «Alaŭdo» ludita de muzikistoj per pajnoŝalmo kaj sakŝalmo estis tre bela. Ĝi kondukis la aŭskultantojn kvazaŭ en la pitoreskan Rumanion, por ĝui la liberecon kaj sendependecon kune kun tiea popolo.


Surbaze de la nacia kaj folkloro tradicio asimilinte medolon de alinacia arto, la rumanaĵoj kreis novajn muzikverkojn kun revolucia politika enhavo kaj intensa epoka spiro. La muzik-danca eposo «1877» kreita por celebri la 100-an datrevenon de la sendependiĝo de Rumanio estas tia reprezenta verko, en kiu reaperis sur la scenoj la herooj kiuj morte batalis por la sendependeco kaj libereco de sia patrolando per armiloj kontraŭ la regantoj de Osman-imperio kaj fine starigis venke la nacian flagon sur sia libera

lando. Ĝi priskribis la heroan spirito de la rumana popolo defendi sentime sian patrolandon. La originale nova projekto kaj perfekte strikta komponado de la danco profunde impresis la spektatorojn.

La popoldancoj luditaj de la ensemblo prezentis la optimismon de varma amo al laboro kaj vivo de la rumana popolo kun intensa vivspiro.


La artistoj kreis kaj prezentis dancojn «Defendo kaj Konstruado», «La Unua Trejnado» k.a. kombinante materialojn el popolaj dancoj kun klasikaj dancoj. Per ili estis montrate kiel la popola armeo sub la gvido de la Rumana Komunista Partio defendis kaj konstruis sian patrolandon, kaj kiel la laboristoj, kamparanoj kaj lernantoj estis milite trejnataj sub helpo de la armeo, kaj kiel ili frate kunlaboris.

La prezentado finiĝis per la kantado de «La Partio — Ceausescu — Rumanio». Tiu majeste bela kanto manifestis senliman varman amon de la rumana popolo al la Partio kaj la gvidanto. Kaj per varmaj manklakadoj la ĉinaj spektatoroj aplaudis la rumanaĵojn pro ilia diligenta penado kaj laŭdis ilian eminentan arton.



Broditaj kaj bidaj metiartaĵoj

Broditaj aromajuĵoj




Bidaj kokoj

La broditaj objektoj de Caŭgou kaj la bidaj objektoj de Santoŭ estas metiartaĵoj de nia Guangdong-provinco. La unuaj origine estis nomataj aromaj saketoj. Ili estas faritaj el silkajo, broditaj per oraj, arĝentaj kaj diverskoloraj silkaj fadenoj en formo de birdo, insekto, fiŝo, floro kaj frukto kaj remburitaj per aromajo. La lastaj estas faritaj el koloraj bidetoj ligitaj per fadenoj en formo de animalo, lanterno kaj ĉiutagaj bezonaĵoj. La lerte faritaj, diversformaj, vivecaj kaj buntaj objektoj de la diritaj du specoj de metiartaĵoj riĉas je lokaj gustoj kaj nacia stilo.



Broditaj cervoj



Bida koko



La gvidanto de Doina donacas memorajon al ĉina amiko.



Varma bonvenigo al la Rumanan Armean Ensemblo Doina



Ĉinaj kaj rumanaĵ armeaj artistoj kune ekskursas en parko.

Doina en


3






1

Ĉinia




1,2,3 : Popolaj dancoj kaj muzikajoj
prezentitaj de Doina



2

La danco "1877"





1. Tang Seng kaj liaj disĉiploj Sun Vukong, Bagie kaj Sa Seng iradas tra montoj al la Okcidento por akiri sutron.

2. La Skeletospirito estas kruela monstro. Si deziras manĝi Tang Seng, sed timas Sun Vukong.

3. La Skeletospirito transformiĝis en knabinon. Si descendis la monton kun korbo da delikataj farunaĵoj kaj ridetante salutis Tang Seng.



4. Svingante orelegojn Bagie diras al Tang Seng: "Grumbblas nia stomako pro malsato. Kial ne preni iom de ŝi?"

5. Sed Sun Vukong travidis la ruzon de la Skeletospirito kaj indigne levas sian magian bastonon por bati ŝin.

6. La Skeletospirito transformiĝis en strion da nebulo por forfuĝi, kaj Sun Vukong strikte persekutas ĝin.

Sun Vukong trifoje batis Skeletospiriton

Teksto adaptita de KIN KIN

Bildoj de VAN HIAŬJU

Temas pri fragmento el la vaste cirkulanta mito pri pilgrimado de fama bonzo Hjuanguang de Tang-dinastio, alinomata Tang Seng, al la Okcidento kun siaj tri disĉiploj. Survoje ili renkontis la Skeletospiriton, kiu klopodis por kapti kaj formanĝi la bonzon trifoje ŝanĝinte sian formon. Sun Vukong travidis la artifikojn de la monstro. Ekstermis ĝin kaj poste daŭrigis la pilgrimadon.



7. La Skeletospirito transformiĝis en maljunulinon kaj plendas al Tang Seng kun larmoj: "Sun mortigis mian filinon! Kompatu min!"

8. Sun Vukong sin jetis al ŝi por refoje ŝin bati. La laŝta transformiĝis en nubon kaj fuĝas ĉielen.

9. Tang Seng krias: "Vukong, ĉu vi freneziĝis? Kial vi mortigis du bonulojn?"



10. La Skeletospirito transformiĝis en maljunulon kaj diras ĉagrene kun larmoj: "Redonu miajn edzinon kaj filinon! Mi morte luktos kun vi!"

11. Tang Seng ne povas distingi monstron de homo, sed Sun Vukong tuj levas sian bastonon kaj triafoje batas la monstron.

12. Tang Seng forpelis Sun Vukong pro lia malbeo kaj tio tre ĝojigis la monstron.

(Daŭrigota en la venonta numero)

V- 19034 / 1978

